

Turka Stelo



SALUTON,

"En la korona epoko Esperanto-sumoo estas la plej bona rimedo por lernado kaj movado de Esperanto."

Tiel diras la organizanto de la Esperanto-Sumoo Hori Jasuo el Japanio.

Sumoo estas japana tradicia lukto. Ĉiun jaron okazas 6 konkursoj en neparaj monatoj: januaro, marto, majo, julio, septembro, kaj novembro. Unu konkurso daŭras 15 tagojn.

Okaze de tiuj konkursoj, Hori Jasuo proponas al vi partoprenon en lukto, kie homoj ne luktas kontraŭ aliaj homoj, sed kie homoj luktas kontraŭ siaj malfortaĵoj. Tiu estas la Esperanto-Sumoo konkurso en kiu paralele kun la Sumoo-konkursoj oni legas Esperanto-librojn dormantajn en sia breto.

Vi decidus kiun libron kaj kiom da paĝoj vi legos ĉiun tagon dum la konkurso. Se vi sukcesos legi tiun kvanton, vi venkos, se ne, tio signifas vian malfortaĵon. Tiamaniere vi povos vere scii la ĝojon de Esperanto-legado, sekve vi progresos multe en Esperanto, kaj se multaj partoprenos en sumoo, tio ŝanĝos la movadon,

kaj sekve la mondon.

Vi partoprenu kaj luku ĝoje!!!

Turka Stelo estas revuo, kiu ofte estas legata en la Esperanto-Sumoo konkursoj. Jen por vi nova numero de Turka Stelo, por ke vi legu en majo, la venonta Esperanto-Sumoo .

Bonan legadon al ĉiuj !

Enhavtabelo

Malfermo	1
Enhavtabelo	2
Kursoj	2
14 Aprilo 1917	2
Sumoo	3
UEA	3
TEJO	3
Leteroj de niaj legantoj	4
Ciklo kun Hori Jasuo	4
Tempo Sigelita	5
FILOKTETO (ΦΙΛΟΚΤΗΤΗΣ)	6
Bildoj el la historio de la Esperanta Literaturo	9
El la libro de "Dao de Jing"	10
La Kimero - Rakonto el la estonteco (10)	11
El la literaturaj paĝoj de MAS	13
Serpento kaj ŝafo	14
Analizo de menskuracisto Dro Frédéric Badel	14
Amuza Matematiko	16
Astrologio - Aĝrilo/Virŝafuloj	16
Poeziaĵoj de Ilir Zhiti	17
Mia Penso	18
Versojn oni ne aĉetas	18
Mia domo (1988)	19
Mirinda renkonto (6/10)	20
Vilmos Benczik – konstruinto de kolonoj	21
Sur vojo de l'vivo	22
Ŝercoj	23
Silaba krucvortenigmo	23
Mirinda Esperanto trovaĵo	24
La edukado	25
La arbarokato kaj mi	26
La vekiĝo	27
Solvo de la krucvortenigmo	31
Facilaj rakontoj	32

Kursoj




En la 22-a de februaro okazis kunveno por konatigi Esperanton al nesperantistoj. Pro la kronviruso kaj kvaranteno estas neniu ebleco aktivi pri Esperanto lingvo.

Ekde la 22-a de novembro ni komencis serion de retaj kursetoj, ĉiu 30 minutojn longa, ĉiusemajnaj, pere de google.meet, pri diversaj gramatikaj punktoj de Esperanto. Temoj kaj iliaj planitaj datoj estas la jenaj:

- 22/11 Akuzativo
- 29/11 Transitiveco
- 06/12 Parteciploj
- 13/12 Korelativoj
- 20/12 Prepozicioj
- 27/12 Sufiksoj
- 03/01 Refleksiva pronomo: Si

<https://edukado.net/kursejo?kid=27268>

14 Aprilo 1917



Ni atendas leterojn el niaj geamikoj



Nia revueto atendas leterojn el niaj geamikoj!

Ni invitas ĉiujn geamikojn, ambaŭ turkoj kaj fremduloj, skribi kaj sendi al ni siajn opiniojn pri nia revueto, pri Esperanto kaj pri aliaj aferoj kiel memoroj, reĉenzoj de libroj jam legitaj, vojaĝoj, kongresoj, ŝercoj ktp. Ni aperigos ilin en nia revueto. Bonvolu aldoni vian nomon, aĝon, urbon kaj landon. Nia kontakt-adreso estas: vasilkadifeli@gmail.com

La redaktanto ne respondecas pri la subskribitaj aŭ republikigitaj artikoloj.

Esperanto-Sumoo



En la korona epoko Esperanto-sumoo estas la plej bona rimedo por lernado kaj movado de Esperanto.

La marta sumoo (la 68a Sumoo) okazos inter la 14-a kaj 28-a de marto

Nia retejo:

<http://www.esperanto-sumoo.pl/>

Sumoo en Vikipedio:

https://eo.wikipedia.org/wiki/Internacia_Esperanto-Sumoo

Fejsbuko:

<https://www.facebook.com/groups/759066970888217/?fref=ts>



UEA



N-ro 940 (2021-03-24)
2021, la Jaro de Dante: Esperanto-kunlaboro kun la "Casa di Dante" en Florenco [...]

N-ro 939 (2021-03-22)
Junulara konkurso Grabowski
La juĝkomisiono Grabowski anoncas specialan konkurson por gejunuloj kun la temo "La dudekaj jaroj, alia mondo?". [...]

N-ro 938 (2021-03-21)
Daŭras la laboroj por la 106-a UK, Belfasto: favorpreze aliĝu ĝis la 31-a de marto [...]

N-ro 937 (2021-03-15)
Nova retpoŝtadreso kaj limdato por la Belartaj Konkursoj 2021 [...]

N-ro 936 (2021-03-12)
Donacoj al la Ĝenerala Kaso de UEA en 2020 fluis abunde! [...]

N-ro 935 (2021-03-07)
Mesaĝo de UEA al Unuiĝintaj Nacioj kaj Unesko okaze de Internacia Virina Tago, 8 marto 2021 [...]

N-ro 934 (2021-03-06)
Panelo KOVIM-19, kiel ĝi ŝanĝis nin?, kun Margaret Zaleski-Zamenhof kaj aliaj, la 13-an de marto, 15h00 UTC [...]

N-ro 933 (2021-03-01)
Sukcesa agado de UEA ĉirkaŭ la Internacia Tago de la Gepatra Lingvo [...]

TEJO



Partoprenu en video de TEJO kontraŭ rasismo
Ni parolu pri

rasismo. Lastatempe oni multe atentis la ŝokajn revelaciojn de rasisma konduto en la monarkia familio de Britio. [...]

Internacia Tago por Elimino de Rasa Diskriminacio 2021 – Deklaro de TEJO

En 1979, la Ĝenerala Asembleo de UN, maltrankvila pri kresko de etna diskriminacio kaj rasismo, adoptis agadplanon por agi kontraŭ ĉia etna malamo kaj antaŭjuĝo. [...]

Internacia Tago de Virinoj 2021

Kiel ĉiujare, hodiaŭ, la 8-an de marto, ni memorigas la Internacian Tagon de Virinoj. [...]

International Women's Day 2021

As every year, today, on the 8th of March, we are commemorating International Women's Day. [...]

Daŭripoveca teamo bezonata

Ĉu ankaŭ vi havas zorgojn pri la klimatkrizo kaj interesiĝas pri ekologiaj kaj daŭripovecaj temoj? [...]

Partoprenu en video pri adoleskuloj


Ĉu vi aĝas malpli ol 19 kaj vi parolas Esperanton? [...]

Leteroj de niaj legantoj



Estimata s-ro,
Koran dankon pro via forsendo de Turka Stelo! Mi estas tre ĝoja vidi la artikolon de Dr. Kudo Nobuo en la gazeto. Mi tuj sendis la kopion al Dr. Kudo.

Kacu Matoba el Japanio




Koran dankon por kundividi vian revuon.
Amike,
Drago Dušić el Kolombio



Mi tre ĝojas ricevi la "Turka Stelo"n . La enhavo estas tiom bunta ke ĉiu povas trovi tion, kio plej interesas lin/ŝin aŭ sin mem laŭ la humoro de la tago. Koran dankon .

Franciska Toubale el Aŭstralio



Saluton! Mia amiko el USONO sendis al mi la numeron 63 de TS. Brilega aranĝo de la enhavo kaj aspekto! Nomi "pri nia revueto", ke ĝi estas -et- --- apenaŭ eblas, 32 paĝoj, bone redaktitaj. Vere, ekplaĉis!

Geĉjo Bas el Rusio



Mi bonorde ricevis la martan numeron de TS. Koran dankon kaj cxion bonan!

Iosif Nagy el Rumanio



Est-a, Estante iom pli libera ol kutime, mi lastatempe trafis la ideon trakribri kelkajn pasintajn numerojn de Turka Stelo, eĉ se nur por okupiĝi. Ĉiuj scias ĉitempe kio okazas en la tuta mondo pro la timiga viruso (aŭ timigaj virusoj!!), eĉ legante la aŭdacan averton: "Atentu vian vivon, restu hejme". En Turka Stelo facile troviĝas io leginda kaj ĝuinda. Mi konsideras ĝin, kiel brevieron de diversaj beletraĵoj poeziaj kaj prozaj. Ĝi proponas ne nur poemojn sed ankaŭ filozofiajn temojn, rakontojn, k.t.p. Oni povas do pasigi sian kelktempon legante kaj kultur-riĉigante sin. Iam mi legis la jenajn vortojn (proksimume): 'On kreu tempon legante.' Dankon pro via laboro kaj pro tiu de viaj kunlaborantoj.

Carmel Mallia el Malto



Kara,
Mi gratulas vin kaj ege dankas vin por via laboro. En via "revueto" troviĝas multaj artikoloj, rakontoj, poemoj ! La tuta monato apenaŭ sufiĉas por ĝin legi ĝis fondo. Mi tre ŝatus ricevi ĝin ĉiumonate en mia leterkesto. Tiel mi ne kapablos forgesi ĝin elŝuti !!

Mi antaŭdankas vin,

Kore via kaj vivu Turka Stelo !

Johano el Francio

Ciklo kun Hori Jasuo -- hajkoj kaj poemoj de Elena Popova e Bulgario



Je la lulilo
feliĉa knabino. Ho,
kaj rigardantoj...
Lila hortensi' petas:
" Infanoj, komprenu min!" ...



Ho, glaciaĵoj
je la ĝardeno! Odor'
d' el fantazio.



Printempa ĝojo
de la homara futuro.
Pacon por l' vivo!



Infana ĝojo –
Tago de fraga kuko.
L' patrinoj devas pensi ! ...



Imago pri la
malfeliĉaj virinoj?
Multe en l' mondo!
Senrajtaj, senlaboraj -
honto pri la regantoj! ...

verkis kaj sendis
Elena Popova
el Bulgario
bildoj de **Hori Jasuo**
el Japanio



CARL THEODOR DREYER
LUMO-MALLUMO, OMBRO-VERO, VIRINO-
SORĈISTINO, PEKO-PUNO, MORTO-RESUREKTO,
SANKTA FAMILIO-EKSTERLEĜA



Antaŭ 132 jaroj, homido naskiĝis en Kopenhago kaj antaŭ 53 jaroj, li fermis siajn okulojn al vivo kaj kino en la sama urbo. Li nomiĝis Carl Theodor Dreyer. Ĉi tiu dana kinoreĝisoro en sia tuta vivo de 79 jaroj verkis la manuskripton de 52 originalaj aŭ adaptitaj mallongaj aŭ plenlongaj filmoj, el kiuj li direktis 22 filmojn. Li persone redaktis 6 fikciajn filmojn kaj projektis la scenaron de unu filmo.

Dreyer eniris la sektoron de kino kiam ĝi estis ankoraŭ en sia infaneco kaj tiam estis la periodo de mutaj filmoj. Kino estis tiam formanta sian propran lingvon. Ekde la unua mondmilito, Usono kreskis en tiu kampo, studioj nomataj Triangle (triangulo) estis establita kaj tiel tri apartaj entreprenoj pri filmo-produktado dividis la filmo-ĝenrojn: Komedioj, Western'oj, kaj Romantikaj Dramoj. Holivudo tiam estis ankoraŭ malgranda setlejo. Sed Danio ne estis lando por esti subtaksita dum tiuj militaj jaroj. En la fruaj jaroj kaj post la milito la dana kino vivis eksterordinaran oran epokon. En 1915 en Danio, entute 135 filmoj estis filmitaj, inkluzive de "Pax Eterna" (Eterna Paco). *

La ora epoko de dana kinoarto daŭris de 1910 ĝis 1920. La ĉefa direktoro Benjamin Christensen kaj du danaj aktoroj Asta Nielsen kaj Valdemar Psilander akiris kaj nacian, kaj internacian famon. Ankaŭ, August Blom estis unu el la plej produktemaj reĝisoroj de Danio, li direktis pli ol 100 filmojn inter 1910-1924. Kelkaj el ĉi tiuj filmoj estis "The White Slave Trade" (Komerco de blankaj sklavo, 1910), "Temptations of a Great City" (Tentoj de granda urbo, 1911), "Atlantis" (Atlantido, 1913). **

Ni inkluzivu la sciencfikcian filmon "Himmelskibet" de Holger-Madsen, pri kiu mi verkis en la antaŭa numero de Turka Stelo, inter la verkoj, kiuj lasis spuron en la historio de kino! Jen, en tia medio Dreyer eniris la kinon post 3 jaroj da laboro en ĵurnalismo kaj aviadospertado. Li eklaboris ĉe Nordisk Film en 1913, unu jaron antaŭ la Granda Milito. Frede Skaarup, la estro de la firmao, rimarkis la junan ĵurnaliston, kiu antaŭe verkis kvar scenarojn por Det Skandinavisk-russiske Handelshus. Skaarup dungis lin por plibonigi la intertitolojn de la filmoj en sia studio, kaj Dreyer baldaŭ estis nomumita por la tasko legi kaj taksi la alsenditajn manuskriptojn.

Li mem verkis sufiĉe multajn scenarojn dum li laboris ĉe Nordisk. Laŭ iu fonto; almenaŭ 31, el kiuj 20

realiĝis. En 1918, li direktis sian unuan filmon, "Præsidenten" (La Prezidanto), surbaze de la tre aklamita romano de aŭstra verkisto Karl Emil Franzos. Sufiĉe malmalmoderna melodramo pri la sorto de delogitaj kaj eksterlasitaj virinoj. La filmo pli poste interligas la familiajn kaj delogajn rilatojn en kompleksa revenstrukturo, kiun Dreyer poste pensis kiel fiasko. Tamen la temo de la virino, kiel viktimo de vira deziro kaj publika kondamno jam aperis en ĉi tiu unua penado. " ***

En lia unua filmo "Præsidenten" (La prezidanto), lia lasta muta filmo "La passion de Jeanne d'Arc" (la pasio de Jeanne d'Arc, 1928), "The Day of Wrath" (La Tago de Kolero, 1943) kaj "Gertrud" (1964) ni vidas virinojn suferantajn aŭ delogantajn. Inter ĉi tiuj filmoj, la filmo "You Must Honor Your Wife" (Vi devas honori vian edzinon, 1925), rakontas en pli malpeza kaj amuza maniero la ribeladon de virinoj sen malobservado de la sankta familia institucio, sed ĝi ankaŭ estas pri la subpremo de virinoj.

Sendube la propra pasinteco de la reĝisoro efikas en lia orientiĝo al ĉi tiuj temoj. Ĉar Dreyer naskiĝis ekster geedzeco kaj estis adoptita en la aĝo de 2 jaroj. Li estis filo de Josefina Nilsson, sveda purigistino, kaj Jens Christian Torp, dana bienposedanto loĝanta en Svedujo. La duonpatro de Dreyer, tipografisto Carl Theodor Dreyer, pludonis sian plenan nomon al sia adoptita filo. Lia edzino Marie havis filinon nomatan Valborg de alia viro, kiu ne akceptis la patrecon de la infano. La paro neniam gravediĝis kun siaj propraj infanoj. Kiel akademiano Martin Drouzy skribis: Dreyer havis bonan rilaton kun sia duonpatro, sed ne povis elteni sian duonpatrinon. Tamen ili donis al li bonajn ŝancojn. Li estis sendita al Frederiksberg Realskole, prestiĝa privata lernejo.

Lia biologia patrino, Josefina, poste gravediĝis denove. Sed ŝi mortis la 20-an de januaro 1891, en malfeliĉaj cirkonstancoj post konsumado de sulfuro kiel provo abortigi la feton. Ŝi tiam estis 35-jaraĝa.

Carl havis tre bonajn rilatojn kun sia duonavino, kiu ankaŭ logis kun ili. Ŝi donis al Carl siajn librojn pri okultismo ĝis lia familia malpermesis al li legi ilin...

Ĉi tiuj infanaĝaj memoroj eble estis efikaj en lia filmo nomata "Vampyr" (Vampiro). En ĉi tiu filmo, ni vidas libron, kiu informas pri vampiroj kaj kiun la heroo legas en la domo, kie li estas gastoj.

Carl trapasis siajn finajn ekzamenojn en 1904. Baldaŭ li forlasis la hejmon kaj li diris, ke li neniam plu enpaŝos tien. En 1908, post kiam li ĉesis labori en la telegrafa kompanio, en kiu li konis sian estontan

Estas demando tre malnova, kiu sufiĉe ofte okupis mian penson, tamen ĝis nun respondon mi ne havas. Kia doloro estas pli neeltenebla, ĉu doloro korpa aŭ doloro anima? Kaj ĉar demando nerispondita venigas alian, mi konfuziĝas, tiele mi finvenas al la duba ideo, ke la korpa doloro povas divers-maniere esti mildigita, tamen la anima ne!

Mi pensas pri ĉio tio ĉi ĉiufoje kiam mi memoras mian amatan mitan heroon, Filokteton, la solan personon kiu povus respondi al tiu mia demando. Kaj ĉar mi menciis tiun heroon, mi devas rakonti lian historion:

Filokteto estis reĝo de Magnezio (Μαγνησία), signifa helena regiono de Tesalio (Θεσσαλία), entenanta la montaron Peliono (Πήλιον).

Tiu Filokteto estis konata en la tuta Helenujo kiel la plej bona arkisto. Li estis tre kapabla uzanto de la pafarko ne nur pro sia forto, kuraĝo kaj lerteco, sed ankaŭ ĉar li posedis la plej bonan tian armilon de la mondo kaj de ĉiuj tempoj, la pafarkon de la plej granda helena heroo, duondio Heraklo (Ηρακλής).



Kiam sur la monto Ojto (Οίτη) Heraklo, venenita de la malica centaŭro Neso (Νέσσος), suferegis tiom, ke li decidis brulmortigi sin, li staris sur la ŝtiparo kaj petis de sia filo Ilo (Ιλλος) ekbruligi la fajron. Tamen, la junulo, kiel ĉiuj liaj kunuloj, hezitis, ne kuraĝis obei la tian patran ordonon. Tiam, iu loka potenculo, Pojaso (Ποίας), forte kortuŝite de la dramo de la granda heroo, kaptis la torĉon kaj metis la fajron. Tiam, momenton antaŭ sia ekbruliĝo, Heraklo, dankeme, donis al sia liberiginto sian mirindan pafarkon kaj siajn sagojn. Tiu Pojaso estis la patro de Filokteto, kiu tiele akiris la unikajn armilojn.

Filokteto, invitita, same kiel ĉiuj renomaj, plej fortaj helenaj suverenoj, partoprenis la tuthelanan ekspedicion kontraŭ Trojo (Τροία) per siaj propraj ŝipoj kaj armeo el tre lertaj arkistoj.

Laŭ tre malnova kredo, la sendanĝera aliro al la markolo de Helesponto (Ελλάσποντος) kondiĉis la

favoron de diaĵo, de la duagrada diino Ĥrisa (Χρύση), kies solan templon estis fondinta Jazono (Ιάσων), la ĉefo de la unua plej granda militirado de la kvindek helenaj herooj, alnomitaj Argonaŭtoj (Αργοναῦται), sur malgranda insulo, proksima al la markolo. Ĉiuj sciis tion, sed nur unu, Filokteto sciis kie ekzakte estas tiu nekonata, malgranda insulo de la stranga diino. Do, estis komisiite al Filokteto konduki malgrandan parton de la ŝiparo al tiu insulo, por ke oni rite oferu al la diino la decajn honorojn, sanktoferu al ŝi kaj petu pri ŝia necesa favoro. Ĉefo de tiu flanka misio estis Odiseo (Οδυσσεύς), unu el la plej grandaj armeestroj de la helenaj fortoj.

Filokteto kondukis tute ĝuste siajn kunulojn al la dezerta insuleto, kie la reprezentantoj de la granda armeo faris ĉion religie decan, por kvietigi la diinon kaj gajni ties favoron. Kiam la ceremonioj estis finitaj, Filokteto metis sur la altaron la viktimon kaj li estis preta fari la sanktoferon, kiam, serpento elĵetiĝis el vepro kaj mordis lin en la piedo.

Baldaŭ estis pruvite ke temis nek pri ordinara serpento nek pri ordinara mordovundo, ĉar tio estis io tute stranga, ne konata, ĉar preskaŭ tuje, la vundo inflamigis, infektiĝis, kaŭzis al la malfeliĉa Filokteto teruran, neelteneblan doloron. Kaj estis ne nur la doloro, sed ankaŭ neordinare impresa, malagrabla malbonodoro, ia naŭza fetoro, kiu leviĝis, difuziĝis kaj disvastiĝis ĉiudirekten, tiel, ke neniu persono povis stari apud la vundito.

Dum kelkaj tagoj la kuracistoj, kiuj akompanis la armeon, klopodis fari ĉion plej bonan, ĉion kion ili sciis kaj povis, sed tute vane, la situacio ne ŝanĝiĝis, Filokteto estis en nepriskribeble malbona stato. Malgraŭ tio, la ŝipoj ekiris irante al Trojo, tamen dum la ŝipirado la situacio plimalboniĝis, la tute malbona stato de la vundito pligraviĝis, tiel, la ŝipoj albordiĝis al la tiam preskaŭ dezerta, neloĝata insulo Lemnoso (Λήμνος), kie la kapoj de la misio kunsidis por interkonsiliĝi kaj decidi pri la fendaĵo. Estis embaraso, estis konfuzo, solvo ne estis trovita, do, Odiseo prenis sur sin la iniciaton proponi al la kolegoj la plej maljustan, plej malagrablan sed tute necesan solvon. Bedaŭrinde, oni devis forlasi kelkan tempon, Filokteton en Lemnoso, ĝis la fino de la milito, kiu espereble daŭrus kelkajn monatojn.

Do, en la daŭro de la nokto, kiam Filokteto povis iom dormi, la ŝipoj senbrue levis la ankrojn, foriris; Filokteto restis tute sola en la dezerta insulo!

Tiam venis la dua, same aŭ pli multe suferiga,



doloro; Filokteto estis perfidita de la amikoj, de la kolegoj, de la kunbatalantoj; li estis sola, forĵetita, jam forgesita, suferanta sencesan, neelteneblan doloron, turmentadon tute ekstreman.

Li ne mortis, li transvivis la akran malfeliĉon, nutrate de akra malamo, de espero kaj dezirego pri la plej terura venĝo. Kaj li ne estis tute sola, ĉar li ankoraŭ havis kun si sian miraklan pafarkon, siajn sagojn, kaj la dezerta insulo estis plena je ĉasaĵoj.

Tiele Filokteto spertadis la sencesan, ekstreman turmentadon en la dezerta insulo kaj la tempo pasadis, la monatoj pasadis, la jaroj pasadis, nenio ŝanĝiĝis.

Dume, en Trojo la milito daŭris kaj daŭris. Estis jam pasintaj naŭ jaroj kaj neniu povis antaŭvidi la finon de la plej sangoverŝa milito de ĉiuj epokoj. Ambaŭ kontraŭuloj estis fortaj, obstinaj, necedemaj. La unu post la alia gloraj mili-tistoj, veraj herooj el ambaŭ flankoj falis; ambaŭ flankoj spertis venkojn kaj malvenkojn en sinsekvaj kruelaj bataloj, sed, post tiom da jaroj, nenio estis certa.

En ambaŭ armeoj estis divenistoj, aŭguristoj, divers-rangaj pastroj, kies aŭgurojn kaj orakolojn la armeestroj respektis aŭdis kaj kies konsilojn ili fidis kaj akceptis. La plej altan pozicion en tiu kampo okupis la helena ĉefpastro Kalĥaso (Κάλχας), rekonata kaj respektinda en la tuta helena kaj barbara mondo aŭguristo. Kompreneble, Kalĥaso partoprenis ĉiujn kunsidojn kaj interkonsiliĝojn de la helenaj armeestroj kaj lia opinio ĉiam pezis sur la komunaj decidoj de la reĝoj kaj ceteraj suverenoj. En unu kriza momento de la milito, dum iu tia kunveno Kalĥaso diris, ke certan informon rilate al la finveno de la milito oni povas ricevi de nur unu persono, de unu malamiko, eĉ filo de la troja reĝo, de Heleno (Έλενος), unu el la plej gravaj orakolistoj de la kontraŭa flanko.

Post tio, la decido estis ricevita, oni nepre devis kapti Helenon kaj, kompreneble, tiu tasko estis komisiita al Odiseo, la kuraĝa, riskema kaj plej sprita kaj ruza viro de la helena flanko.

Estis ne facila afero, tamen la rakontado de la entrepreno postulus longan spacon, do, mi diru nur tion, ke la deziro de la Helenoj post ne tre longe efektiviĝis, Heleno estis kaptita en tre bone organizita embusko kaj li estis kondukita antaŭ la konsilio de la helenaj estroj. Post longa enketo, sub minaco de morto, Heleno diris nur tion, ke sen la armiloj de Heraklo la Helenoj neniam venkos la Trojanojn.

Ekregis absoluta silento, ĉiuj klopodis kompreni, klopodis memori, kaj, ve, nur tiam ĉiuj ekmemoris la antaŭ longe forgesitan kunulon, la forlasitan, malfeliĉan Filokteton.

Neniu sciis ĉu li estas ankoraŭ en Lemnos, ĉu li ankoraŭ vivas, ĉu li ĉiam posedas la valorajn armilojn.



Krome, neniu povis pensi tute klare, la koncienc-riproĉado vekigis en ĉiuj koroj, tamen tio ne daŭris longe, en tiaj krizaj momentoj ne povas regi la rimorso, la rigoraj militestroj devis resti nekortuŝeblaj, do, ne povis esti hezito, neniu alia vojo, neniu alia solvo povis esti, krom tio, kelkaj respondaj personoj devis tuj iri al Lemnos.

Estro devis nepre esti Odiseo, kiu bone sciis la okazintaĵojn kaj estis ludinta la ĉefan rolon en la malagraba afero, sed devis esti ankaŭ kun li nekonataj al Filokteto personoj, viroj ne kulpaj pri lia aventuro. Plej taŭga tia persono estis la juna Neoptolemo (Νεοπτόλεμος), nova armeestro, filo de la mortigita granda heroo Aĥilo (Αχιλλεύς), malnova kara amiko de Filokteto.

Kiel eble plej rapide, ŝipoj atingis la insulon kaj multaj viroj komencis la serĉadon de la izolito. La afero ne estis facila, ĉar la insulo estas granda, tamen la inteligenteco de Odiseo ankoraŭfoje brilis. Li tre ĝuste pensis, ke persono izolita nepre trovus ŝirmejon en loko kiel eble plej sekura, do, alta, eĉ kaverno plena. Kaj tiu loko devus esti apud la maro, por ke la izolito povu vidi ĉu ŝipo alproksimiĝas al lia teritorio. Tion pensis Odiseo kaj, jes, tia loko estis trovita kaj, jes, de malproksime oni distingis fumon atestantan homan eston!

Mi ne povas ĉi tie pli detale priskribi la tutan entreprenon, mi venas je tio, ke, jes, oni trovis Filokteton.

Oni trovis ne la konatan Filokteton, sed furiozan sovaĝulon, kiu per kriegoj, ĵetante ŝtonojn, minacante per sia etendita pafarko, forpeladis la invadintojn.

Malnovaj kunuloj de la tiom kruele sortobatita viro, de malproksime klopodadis mildigi lian indignon, moderigi lian agresemon, tamen Filokteto sentis nur neelĉerpeblan malamon kontraŭ siaj malnovaj kolegoj, tiun malamon kiu tenis lin viva dum la mult-jara sia ekzilo, malamo kiu igis iom tolerebla la senfinan doloron kiu ĉiam turmendadis lin.

La situacio estis tre malfacila, postulis paciencon, rezignacion kaj komprenemon, do, iom-post-iome, nur



Neoptolemo iom pli multe alproksimiĝis al la tute evidente suferanta viro, li prezentis sin, li parolis al li pri la falinta en la milito sia amata patro, Aĥilo, pri ties heroaĵoj, li rakontis al li ĉion plej interesan pri la daŭra milito kaj

ankaŭ certigis lin, ke la plej bona helena kuracisto – kirurgo, Maĥaono (Μαχάων), la filo de Asklepio (Ασκληπιός) mem, dio de la medicino, estas en la helena kampadejo kaj li estas tute certa, ke li povos tute kuraci lin de sia vundo, se li iros al Trojo.

Neoptolemo longe klopodis konvinki Filokteton sekvi lin, sed vane. Tamen, kiam la suferanta viro laciĝis, kiam, venkita de dormemo iom kliniĝis, Neoptolemo, ekspluatante la somnolon de la malsanulo, fulme moviĝis kaj sukcesis alproksimiĝi, kapti kaj preni kun si la valoran pafarkon. La reago de Filokteto estis furioza, kvazaŭ sovaĝbesto komencis kriegi, rori, furioze ataki la kontraŭulojn, tamen, tiel serioze vundita, sen siaj armiloj, povis nun malmulton fari kontraŭ tiom multaj armitaj viroj. Finfine li devige konvinkiĝis, li cedis, enŝipiĝis, atingis Trojon, la helenan kampadejon!

Pasis kelka tempo ĝis kiam la miraklofara arto de Maĥaono tute resanigis Filokteton, ĝis kiam tiu lasta reakiris sian pozicion, sian prestiĝon inter la ceteraj helenaj armeestroj, sian povon en la komandado de siaj arkistoj, ĝis kiam li prezentiĝis sur la batalkampoj.

Li prezentiĝis kaj ekde la unuaj tagoj, per sia terura pafarko dissemis timegon al la malamiko, precipe post kiam li pafis kaj mortigis la ĉefrolulon de la troja dramo, Parison (Πάρις), la kaŭzanton de la kruela milito.

Post nelonge la milito atingis sian finon. Filokteto estis ĝis la lasta momento inter la protagonistoj de la helena flanko, eĉ li estis inter la elektitaj plej bravaj kaj kuraĝaj batalantoj, kiuj eniris en la Lignan Ĉevalon (Δούρειος Ίππος) kaj la unuaj invadis kaj konkeris la metropolon kaj la palacojn de Trojo.

Sekvis la foriro de la helenaj armeoj, kiu por kelkaj el ili estis aventur-plena. Filokteto estis inter tiuj malbonsortuloj, kies reveno al la patrujo elmontriĝis neebla. Liaj ŝipoj renkontis sinsekvajn ŝtormojn, kiuj kaŭzis grandajn damaĝojn al kelkaj el ili, fine la ŝiparo de Filokteto fortreniĝis de ondegaro al la bordoj de

Brutio (Βρούπιον), en la sudorienta ekstremo de la itala duoninsulo, ĉe la estuaro de rivero, la nuntempe nomata Neto.

Tie, Filokteto starigis sian kampadejon kaj ordonis, ke oni komencu la riparadon de la ŝipoj.

Inter la kaptitaj Trojaninoj, donitaj kiel milit-predo al la armeo de Filokteto, estis tri junulinoj apartenantaj al la reĝa familio de Trojo. Tiuj virinoj, kiuj bone sciis, ke kiam la armeo atingos Helenujon ili iĝos ne edzinoj, sed ordinaraj sklavinoj, se ne ĉiesulinoj, konspiris, konvinkis la ceterajn virinojn, eble ankaŭ kelkajn virojn, kaj, en la daŭro de unu nokto, forbruligis la ŝipojn.

La konstruado de novaj ŝipoj kaj ties ekipado estis neebla, krome, tiel Filokteto mem, kiel ankaŭ liaj viroj estis jam tre lacaj, preskaŭ konsumitaj. Do, la decido estis facile ricevita, ili lokiĝis en tiu, tute taŭga loko, kie ili nur devis kontraŭstari, militi kontraŭ la indiĝenaj Lukanoj (Λευκανοί).

Filokteto venkis kaj forpuŝis la malamikojn en la internon de la lando kaj li fondis sian unuan civiton Krimizon (Κριμισα), kiu iom-post-iome prosperis, tiel, ke pli malproksime li fondis ankaŭ aliajn urbojn, Makalon (Μάκαλλα), Petelion (Πετηλία), la nuntempe nomatan Strongolo, kaj Ĥonion (Χωνία), ĉe la golfo de Tarento (Τάρας).

Filokteto iĝis popolpatro, forta, glora kaj tre amata suvereno, kiu travivis ŝajne feliĉe la reston de sia vivo. La homoj honoris lin multe antaŭ kaj post lia morto, tamen neniu povis scii, ĉu li iam povis forgesi la suferojn de sia paseo.

Kompreneble, Filokteto inspiris alt-nivelajn artistojn, ĉiujn plej grandajn antikv-helenajn tragediverkistojn, precipe Sofoklon (Σοφοκλής), kaj nuntempajn dramaturgojn kaj alifakajn artistojn.

Ankaŭ Filokteto estis lokita sur la ĉielo, kiel unu ankoraŭ mita asteroido, la konata al la fakuloj “1869 Philoctetes”.

verkis **Spiros Sarafian** el Grekio

GEMOJ EL LA HELENA MITOLOGIA KAJ HISTORIA TREZORO

(elekto, aranĝo de bildoj, de Kostas Kiriakos)



Baldur Ragnarsson (1930 – 2018)

Baldur Ragnarsson naskiĝis en 1930 en malgranda vilaĝo apud unu el la multaj fjordoj, kiuj tranĉas la orientajn bordojn de Islando. Tie li pasigis siajn knabaĝajn jarojn. Lia patro estis instruisto, kaj de li la knabo unue aŭdis pri Esperanto, kiu tuj kaptis lian intereson tiom, ke li havigis al si lernolibron. Lia studado de la lingvo tamen devis atendi ĝis liaj gimnaziaj jaroj en Akureyri, malgranda urbo en la norda landoparto. Tiam li bonŝance trovis en vendejo de malnovaj libroj la unuan lernolibron de Esperanto en la islanda lingvo, eldonitan en 1909, kiu estas fakte islanda versio de la siatempe fama lernolibro “Esperanto en dek lecionoj” (L’esperanto en dix leçons, 1902) de Théophile Cart, la energia apostolo por Esperanto en la komencaj jaroj de la lasta jarcento. Tiun lernolibron li studis dum la somero post sia unua gimnazia jaro, tiam 18-jara, laboranta kiel ordinara vojlaboristo en Orienta Islando. La laboristoj loĝis en tendoj kaj en la vesperoj post la taga laboro li lernis la lingvon en sia tendo, kiun li partoprenis kun alia laboristo, kiu miris pri tia entuziasmo.

En tiu sama somero Baldur akiris siajn unuajn librojn en Esperanto, postlasitajn de bona laboristo, kiu mortis. Inter tiuj estis malnovaj jarkolektoj de la revuo Lingvo internacia kaj Juna Esperantisto kaj, plej grave, la poemaro El parnaso de popoloj de Anton Grabowski. El ĝi li konatiĝis kun la Esperanta poezio, kiu baldaŭ instigis lin verki poemojn en Esperanto. Lia unua poemo estis ampoemo al la lingvo, soneto titolita Al Esperanto, kiu aperis en la tiutempa revuo Voĉo de Islando (1950). Tiu poemo estas bona atesto pri tio, kiel Esperanto povas tutkapti senteman junulon:

*Mirinda Esperanto, amlingvo de l’jarondo,
kreonta homfratecon per klaro fundamenta,
al paco procedanta en firmo ĉirkaŭventa,
homaron kondukanta al frata komprenado.*

*Esper’ de l’ esperulo, al homo animsondo,
venkanta malŝatemon de l’ koro malamsenta,
antaŭen progresadu laŭ ordo regimenta,
donante interpacon al lacigita mondo.*

*Amata esperlingvo, al mi vi estas lum’,
brilanta amostelo sur arta firmament’,
varmiga sanktofajro, brulanta en la kor’.*

*Espere altkreskaĵ’ el de vi farita hum’
ĉielen supreniĝu en dia monument’,
silente atestante pri via lingva or’.*

Post universitataj studoj pri islanda kaj angla lingvoj kaj literaturoj 1952-1956 Baldur laboris kiel gimnazia instruisto de la islanda lingvo, kiel oficiala revizianto de lernolibroj kaj instrumentoj de la islanda lingvo kaj kiel ĉefinspektoro pri la instruado de la islanda en la lernejoj. Li tiam multe verkis en la gepatra lingvo, i.a. du poemarojn kaj plurajn faklibrojn. Li ekaktivis en 1952 en la Esperanto-movado, la islanda kaj la internacia. Li estis estrarano dum diversaj periodoj de la Esperanto-societo de Rejkjaviko kaj de Islanda Esperanto-Asocio. Li estis prezidanto de la Belartaj Konkursoj de UEA 1975-85, estrarano de UEA pri kulturo kaj eduko 1980-86 kaj ĝia vicprezidanto 1980-83. Li estas membro de Akademio de Esperanto ekde 1979 kaj honora membro de UEA kaj de Akademio Literatura de Esperanto.

Kiel originala verkisto en Esperanto Baldur Ragnarsson okupis sin ĉefe pri poezio kaj eseado. Lia unua poemlibro, Ŝtupoj sen nomo, aperis en 1959, la unua libro en la serio “Beletraj kajeroj” ĉe la eldonejo Stafeto, la plej grava eldonejo de Esperantaj libroj post la dua mondmilito. Prologon por ĝi verkis la eldonisto mem, Juan Régulo Pérez, post malakcepto de K. Kalocsay, kiu trovis la poemaron tro noveca por sia plaĉo. Régulo, ĉiam malferma al novaj aŭtoroj, kontraŭe taksis, post detala rakonto pri historio de la manuskripto li skribis i.a.: “Do al mi ŝajnas, ke Ragnarsson sukcesis krei poezion per malŝablona vervo.” Ĝis la dua originala poemaro, Esploroj (1974) pasis 15 jaroj. Tamen en tiu periodo aperis du gravaj tradukoj en Esperanto, Sub stelo rigida (1963), du poemaroj en unu volumo de la islanda poeto Torsteinn frá Hamri, kaj Islandaj pravoĉoj, kvar verkoj el la

antikva islanda literaturo. En 1964 li ricevis la Arĝentan spronon de "Koko" pro originala verkado. En 2003 aperis lia traduko de la plej granda el la malnovaj islandaj sagaoj Sagao de Njal kaj en 2008 la Edda, la fama verko de Snorri Sturluson (1179-1241) pri la pranorda mitologio. En la sama jaro aperis la plej ampleksa traduko de Baldur, la granda romano Sendependaj homoj de la Nobelpremiito (1955) Halldór Laxness. Tri poemoj en unu volumo, Vundebla loko, de juna islanda poetino, Gerdur Kristny, aperis en lia traduko en 2010. Ankaŭ en Esperanto-revuoj, precipe la islanda La Tradukisto, aperis multaj dekoj da poemoj kaj rakontoj tra la jaroj.

En 2007 aperis ĉe la eldonejo Edistudio en Pisa sub la nomo La lingvo serena la kolektita originala verkaro de Baldur Ragnarsson ĝis tiu tempo: la du poemoj kaj kelkaj novaj poemoj kaj granda fasko de

eseoj pri diversaj temoj, precipe pri la islanda kaj Esperanta literaturo. Akompanas esoj pri la poezio de Ragnarsson de kvin literaturistoj. Tiu evento vigligis la poeton al plua verkado: en 2008 kaj 2010 aperis de li novaj poemoj: La neceso akceptebla kaj La fontoj nevideblaj.

Baldur Ragnarsson estis elektita en 2006 de Esperantlingva Verkista Asocio, nun Akademio Literatura de Esperanto, kiel kandidato por la Nobelpremio por literaturo.

de **Baldur Ragnarsson**

(Juna amiko, decembro 2010)

Fonto: <http://literaturo.esperanto.net/tekstoj/ragnarsson/ragnarsson.html>

El la libro de "Dao De Jing" verkita de ĉina filozofo Laocio, fondinto de Taoismo

DUA PARTO - LA VIVO

80

**Lando estu malgranda
kaj ties loĝantoj malmultaj.
Ilojn, kiuj plimultigus la fortojn de la homoj,
oni ne uzu.
Oni faru, ke la popolo konsideru grava la morton
kaj ne vojaĝu malproksimen.
Kvankam estas ŝipoj kaj ĉaroj,
estu neniuj, kiu veturigu ilin.
Kvankam estas kiraso kaj armiloj,
estu neniuj, kiu ekuzu ilin.
Oni faru, ke la popolo ree nodu ŝnurojn
kaj ilin uzu anstataŭ la skribo.
Oni faru dolĉa iliajn manĝojn
kaj bela iliajn vestojn,
pacaj iliajn loĝejojn,
kaj ĝojaj ties morojn.
Eĉ, se najbaraj landoj troviĝus
en viddistanco, tiel,
ke reciproke oni povus aŭdi
la vokon de la kokoj kaj hundoj,
la homoj tamen mortu en la plej granda aĝo
sen tio, ke ili vojaĝis tien kaj reen.**

Rimarkoj de Anniespera

Vilhelmo:

„Oni faru, ke la popolo konsideru grava la morton.“

En Ĉinio plej multaj homoj komprenas ĝin tiel, kiel en la traduko de Wang Chongfang:

„La popolo ne risku sian vivon“



Vilhelmo:

„la homoj tamen mortu en la plej granda aĝo
sen tio, ke ili vojaĝis tien kaj reen“

Pri tiu ĉi frazo, laŭ mi, la traduko de Wang Chongfang estas pli fidelakaj konciza:

„Tamen ili neniam vizitus unu alian ĝis ili mortus de maljuneco.“

Rimarko de Cezar

Bela penso estas, ke oni, havante armilojn kaj kirasojn, tamen kiel eble plej malmulte uzu ilin. Goeto uzis tiun pacigan penson por poemo, en kiu erinaco fakte estas armito, sed samtempe pacoheroo.


Interesa afero estas, ke la ĉinoj en certa historia periodo efektive rezignis pri tio sendi plu esploristajn ŝipojn en nekonatajn landojn, kvankam ili havis bonegajn ŝipojn, kiuj tiujn en Eŭropo eĉ superatutis. Ankaŭ la ĉina muro estas indiko pri tia pensado, kies celo unuavice certe estis enfermi kaj konservi tion, kion oni jam havas anstataŭ serĉi novajn aventurojn.

Rimarko de Anniespera

Jes, sed tio okazis pli poste ol en la periodo de Laocio. En la tempo de Laocio tio nur estis lia revata lando. ^ _ ^

(daŭrigota)

Kidnapo



Ĉimpanzo povus esti enmetata en batalon. Eventuale ĝi estus ankaŭ taŭga kandidato por spacveturado.

„Morgaŭ ni ekos“, postulis Bodo. Li sidis kune kun Herbert en gastejo. Ili priparolis novan, grandan majstraĵon.

„Lasu tion, nia lasta atako ja tute fiaskis, ni ĵus forlasis la malliberejon. Kial vi denove planas tion?“, demandis Herbert.

Sed Bodo finfine konvinkis lin. Ĉifoje temus pri tute sendanĝera afero, pri forrabo de tiu superĉimpanzo. Ili trovis bonan lokon ekster la urbo, en trankvila vilaĝo. Tie oni povus instali sekuran stalon por enkaĝigi la ĉimpanzon. Tiam ili simple ĝisatendus.

Bodo fanfaronis: „Ni certe ricevos abundan elaĉetan monsumon. Krome ni ofertas forvendi la simion al aliaj interesuloj. Ni ja disponas pri bonaj rilatoj. Nur atendu, ni ĉiuokaze sukcesos!“

La nigraj uniformoj de iu sekureca servo donis la impreson ke ambaŭ friponoj estas profesiuloj. Herbert prizorgis la veturilon, malgrandan ŝarĝaŭton por sekura montransporto. Enmane kun falsitaj dokumentoj ili eniris la instituton kaj transdonis la paperojn al la pordisto. Jam antaŭe ili eltrovis la ĝustan tempon, dum kiu la respondeca bestozorganto havus sian paŭzon. Portilo kun radoj portis la longan keston. La pordisto neniel suspektis, do la duopo povis senprobleme preterpasi. Tiam ĉio rapide okazis. Herbert malfermis la seruron de la baraĵo por la ĉimpanzoj per la ŝlosilo, pri kiu li estis zorginta antaŭe. Li ĵetis grandan nombron da vinberoj sur la grundon. Daŭris nur kelkajn minutojn kaj la tuta ĉimpanza familio venis al la antaŭa areo.

Bodo tuj narkotis la etan Mojo kaj lokis lin en la keston. La pordo de la baraĵo estis korekte ŝlosita. La duo afable adiaŭis ĉe la pordisto kaj ŝovis la portilon kun la kesto en la ŝarĝaŭton. La tuta ago daŭris malpli

ol dek kvin minutojn. Sufiĉa tempo por la posta reveno de la bestozorganto el la paŭzo.

„Ĉu mi ne antaŭdiris tion? Ĉio estis vere tre facila“, ekĝojis Bodo. Herbert stiris la ŝarĝaŭton al la antaŭurba kaŝejo. Neniu sekvis ilin. La kaĝo troviĝis en ŝedo sur forlasita bieno. Neniu vizanto vizitus tiun lokon. Post du horoj Mojo vekigis kaj rimarkis, ke li ne plu troviĝas en la instituta baraĵo. Li eksaltis kaj forte skuis la kradaĵon kaj la kaĝan pordon. Sed li havis nenian ŝancon. Finfine liaj forrabistoj proksimiĝis al la kaĝo kaj enŝovis plastikan botelon kun akvo. Mojo tuj ĵetis ĝin for de la kaĝo. Li celis al Bodo, sed ne trafis lin.

„Ni lasu lin krei. Ĉi tie ĉiuokaze neniu aŭdas lin“, opiniis Herbert. Bodo rediris: „Jes, vi pravas, sed la kriaĉo vere ĝenas min. Kion vi pensas? Ĉu ni donu al li ankoraŭ kelkajn vinberojn?“

Montriĝis, ke la vinberoj mankis. Mojo intertempe tre bone komprenis, ke la kriadon estis severa ĝeno por la du. Do li daŭrigis tion. Bodo kapitulacis: „Mi ne povas elteni tion plu. Restu ĉi tie kaj gardu lin bone. Mi veturas nun al la superbazaro kaj aĉetos kelkajn vinberojn. Estu atenta, Herbert!“

Ĝuste tio estis la plano de Mojo. Nun restis ankoraŭ nur unu gardisto. Mojo daŭrigis sian kriadon. Dum tio li kelkfoje vokis: „Malsato! Malsato“. Herbert ektimis. Li sciis, ke tiu ĉimpanzo scipovis paroli, sed tion li neniam antaŭe aŭdis. La fakto, ke ĉimpanzo tiom bone kompreneble vokas, timegis lin. Haste li traserĉis sian dorsosakon kaj trovis ankoraŭ unu bananon. Tiun li ĵus volis ĵeti en la kaĝon, kiam Mojo subite kolapsis. Samkiel mortinto li terenfalas kaj ne plu moviĝis.

Herbert ne sciis kion fari nun. Ĉu la tuta streso estis tro multe por la simio? Ĉu estis korinfarkto aŭ nur sveno? Bodo revenos post ĉirkaŭ dek minutoj. Tial Herbert nun devis mem decidi. Singardeme li malŝlosis la pordon kaj iris al Mojo direktante la elektroŝokilon al li. „Gardu vin bone. Ne risku tro multe“, li pensis kaj tuŝis la ŝultron de Mojo per la armilo. Mojo ne reagis. Herbert nun per la alia mano prenis la bananon kaj tenis ĝin antaŭ lian vizaĵon.

Ĝuste tiun momenton Mojo nur atendis. Li larĝe malfermis la buŝon kaj per la tuta forto de la makzeloj li ekmordis kaj boris siajn masivajn dentojn en la malsupran brakon de Herbert. Tiu kriis pro doloro kaj ne sukcesis uzi la armilon. Mojo ekkaptis lian kapon per la du manoj kaj puŝis ĝin kontraŭ la metalan kradaĵon. Seninterrompe li daŭre mordis ĝis Herbert finfine restis kuŝanta sur la grundo.

Mojo lasis lin kuŝanta en la kaĝo kaj fermis la



pordon. Li detiris la ŝlosilon kaj ĵetis ĝin alten for el la fenestro. Poste li kuris eksteren. Kien? Sur la strato estis tro danĝere, ĉar Bodo certe baldaŭ revenus. Tial Mojo foriris plej eble kaŝe. Li kuris apud la strato, sur la kampoj, malantaŭ arbustoj aŭ konstruaĵoj. Li ne sciis kien.

Fine li atingis la limon de la vilaĝo. Sur la granda placo staris tendo de eta cirko. Apude troviĝis la loĝveturiloj kaj la kaĝoj. Unu de tiuj kaĝoj eĉ loĝigis malgrandan simion, kiu, ekvidante Mojo, tuj ekkriis. La tuta teamo de la cirko kunvenis.

„Tio certe estas tiu superĉimpanzo“, vokis unu el la kunlaborantoj. Alia opiniis: „Tre bone, li certe taŭgos por nia venonta prezentado!“

Tion ankaŭ la aliaj pensis. Mojo nur aŭdis „Ni kaptu lin!“, kaj denove li troviĝis en kaĝo. Elĉerpita pro la fuĝo, li kolapsis. Pepe, la cirka domptisto, diris sarkasme: „Malfortulo! Almenaŭ donu al li ion por trinki kaj persiko kiel premio.“ Sed Mojo kaŝiĝis senmove sur la planko de la kaĝo, la kapo pendigita, la brakoj tute senenergijaj. Eĉ la suka persiko ne povis ĝojigi lin.

„Lasu lin sola por nun. Morgaŭ li estos denove viva kaj tiam ni povos komenci la dresadon,“ diris Pepe. Ĉiuj nun retiriĝis sed Mojo ne plu rimarkis tion. Intertempe pro elĉerpiĝo li ekdormis.

La sekvan matenon Donka estis la unua ĉe la kaĝo. La ok-jara filino de la cirko-posedanto ludis kun sia nova, bunta ombrelo kaj ŝi paŝis tien kaj reen antaŭ la kaĝo. Ŝi premis la pinton de la ombrelo kontraŭ la stangoj. Pro la klaka bruo Mojo ekvekiĝis. Timigita, li leviĝis. Tiu bruo ne estis eltenebla por li.

„Ĉesu!“ li kriis laŭte. Donka tuj haltis. Ŝi ja sciis, ke ĉi tiu ĉimpanzo povas paroli, sed ŝi ne volis kredi tion. Nun ŝi fakte aŭdis tion. „Pardonu min“, ŝi

murmuris mallaŭte. „Mi ne volis timigi vin.“ Poste ŝi sidiĝis sur la planko antaŭ la kaĝo kaj hontante enŝovis sian novan ombrelon tra la stangoj. Unue, Mojo tute ne reagis. Sed subite li rimarkis, ke ĉi tiu knabino ploris.

„Mi vere ne volis tion,“ ŝi suspiris apenaŭ aŭdeble. Mojo proksimiĝis al la krado, pasigis sian manon tra la stangoj kaj karesis Donka sur la ŝultro. „Ĉu vi volas helpi min?“, li demandis trankvile. Donka rezulte de timo saltis supren. „Jes, mi tuj telefonas al mia patro kaj rakontos al li ĉion. Li certe helpos vin.“

La patro de Donka ne estis en la cirko dum kelkaj tagoj ĉar li devis aranĝi ion en la urbo. Liaj kunlaborantoj ankoraŭ ne informis lin pri la ĉimpanzo. Mirigita li ricevis la alvokon de sia filino. „Kio okazas, mia eta? Kial vi vokas tiel frue? Vi kutime neniam faras tion.“

Donka nun pli kaj pli rapide parolis kaj raportis ĉion al sia patro. Ŝi eĉ ekploris kriante, „Ĉu vi ne povas liberigi lin? Ni ja havas sufiĉe da bestoj ĉi tie!“ Pepe aŭdis tion kaj tuj forprenis la poŝtelefonon de Donka. „Donu ĝin al mi! Ne intermiksiĝu! La ĉimpanzo restos ĉi tie! Mi nun parolas kun via patro.“

Sed la domptisto ne povis konvinki lin. Por la posedanto de la cirko estis demando pri honoro resendi Mojo al la instituto. Do, Mojo nun disponis pri sufiĉa subteno por la vojo hejmen.

(daŭrigota)

verkis **Klaus Friese** el Germanio
(plumnomo **Erik Tantal**)

fonto: <http://esperanto-klaus.de/>

13>>



¹ Rilko naskiĝis en Prago 1875 (ĉefurbo de Bohemio kun tiam germanlingva urbocentro), kiun li definitive forlasis 21-jara por loĝi en Munkeno, Berlino kaj poste Parizo. Li vojaĝis dum sia tuta vivo tra Eŭropo (Rusujo, Italujo, Hispanujo, Germanujo, Svislando ktp.). 1921 li ekloĝis en Svisujo,

kie li mortis pro leŭkemio en 1926.

elgermanigis Vilhelmo LUTERMANO el Kubo

*** publikigita kun permeso de la tradukanto ***

Fonto: http://vlutermano.free.fr/rilko_eleg2.html

La dua elegio



Ĉia anĝelo estas terura. Kaj tamen, ve' min,
prikantas mi vin, birdojn preskaŭ mortigajn de la animo,
scie pri vi. Kien la tagoj Tobiaj,
kiam el la plej radiantaj unu staris ĉe la simpla
dompordo,
iom maskite al vojaĝo kaj jam ne plu terura;
(junulo al la junulo, kiam li scieme elrigardis).
Paŝus la arkanĝelo nun, la danĝera, el malantaŭ la
steloj
per unu paŝo nur malsupren kaj ĉi tien : altegen
batante mortbatus nin la propra kor'. Kiuj vi estas?

Frue sukcesintoj, vi dorlotitoj de la kreaĵo,
altaĵoj, matenruĝaj krestoj
de ĉia kreo, poleno de floranta diaĵo,
artikoj de lumo, galerioj, ŝtuparoj, tronoj,
spacoj el esto, ŝirmiloj el ĝuego, tumultoj
de ŝtorme ravita sento kaj subite, solaj,
speguloj : kiuj la elfluantan belon
reĉerpas reen en la propran vizaĝon.
Ĉar ni, sentante, forvaporigas; aĥ ni
elspiras nin for; de ardo al ardo
nia odoro malfortiĝas. Jen iu eble diras al ni:
Ja, vi eniras mian sangon, tiu ĉambro, tiu printempo
pleniĝas je vi... Kion helpas, li ne povas nin reteni,
ni malpliĝas en li kaj ĉirkaŭ li. Kaj tiuj estante belaj,
ho kiu ilin retenas? Senĉese en ilia vizaĝo
ŝajno sin levas kaj foriras. Kiel roso de frua herbo
la nio sin levas de ni, kiel la varmo de
varma manĝaĵo. Ho rideto, kien? Ho suprenrigardo :
nova, varma, foriĝanta ondo de l' koro -;
ve al mi : ni tio do estas. Ĉu do la kosma spaco,
en kiun ni dissolviĝas, gustas je ni? Ĉu la anĝeloj
vere kaptas nur siaĵon, el ili eliĝinton,
aŭ ĉu foje, kvazaŭ erare, kunestas
iom de nia esenco? Ĉu en iliajn
traĵtojn ni estas nur tiom miksitaj kiom la vageco vizaĝa
de gravedulinoj? Tion ili ne rimarkas en la kirliĝo
de ilia reveno al si. (Kiel ĝin ili rimarkus.)

Amantoj povus, se ili ĝin komprenus, en nokta aero
paroli mirakle. Ĉar ŝajnas, ke ĉio
nin kaŝas. Vidu, la arboj estas; la domoj,
en kiuj ni loĝas, daŭre ekzistas. Nur ni
preterpasas ĉion kiel aeruma interŝanĝo.
Kaj ĉio unuanimas por nin prisilenti, duone kiel
honto eble kaj duone kiel nedirebla espero.

Amantoj, vi unu en la alia sufiĉantoj, al vi
mi demandas pri ni. Vi kaptas vin. Ĉu
pruvojn vi havas?
Vidu, al mi okazas, ke miaj manoj
reciproke konsciiĝas aŭ ke la uzita vizaĝo
mia en ili ripozas. Tio donas al mi
iom da sento. Sed kiu kuraĝus pro tio jam esti?
Tamen vi, pliiĝantaj en la ĝuego de la alia,
ĝis kiam li subigite vin petegas:
ne plu -; vi kiuj reciproke sub la manoj
pli ampleksiĝas kiel vinberaj jaroj;
vi, kiuj foje svenas, nur ĉar la alia
tute superiĝas : vin mi demandas pri ni. Mi scias,
vi tuŝas vin tiom beate, ĉar la kareso haltas,
ĉar la karesatejo ne foriĝas, kiun vi, teneraj,
kovras; ĉar vi sube sentas la puran
daŭron. Tiel vi atendas preskaŭ ĉiamon
de la brakumo. Kaj tamen, kiam vi sukcesas
la terurojn de la unuaj rigardoj kaj la sopiron
ĉefenestran,
kaj l' unuan iradon komunan, *unufojan* tra la ĝardeno:
amantoj, ĉu tiaj ankoraŭ tiam vi estas? Kiam unu al la
alia
vi levas vin al la buŝo kaj ekas -: trinkaĵo ĉe trinkaĵo:
ho kiom la trinkanto strange preteriras la agon.
Ĉu vin ne mirigis sur Atikaj steleoj la prudento
de homa gesto? ĉu amo kaj adiaŭo ne estis metitaj
sur la ŝultrojn tiom malpeze, kvazaŭ faritaj
el alia substanco ol ĉe ni? Memoru la manojn,
kiom senpeze ili ripozas, kvankam entorse staras la
forto.
Tij memregaj sciis per tio: tiom estas ni,
tio ĉi estas nia, *tiel* nin tuŝi; pli forte
nin tuŝegas la dioj. Sed tio estas afero de l' dioj.
Ke ankaŭ ni trovu puran, diskretan, mallarĝan
homecon, strion nian de frukta lando
inter riverigo kaj rokaĵ'. Ĉar la propra koro nin superas
ankoraŭ kiel tiujn. Kaj ni ne povas plu ĝin
postrigardi en bildojn, kiuj ĝin trankviligu, nek en
korpojn diajn, en kiuj pli grande ĝi moderiĝu.

de **Rajno Mario RILKO**¹ (Rainer Maria Rilke)

Germana originalo: **Rainer Maria Rilke**: Duineser
Elegien.

Serpento tenis sin sub iu ŝtupo
 Kaj pri la mond' koleris ŝi.
 La furioza emoci'
 Ĝin regis akre, laŭ principo.
 Ŝafido en proksim' ĝoj-saltis sen atent',
 Sen iu penso pri Serpent'.
 Subite la Serpent' elrampis kaj ekpikis:
 Dolora pik' al mizerul' efikis.
 Ekbrulis sango pro venen'.
 "Sed kia estas kulp'?" ĝi diris kun ĉagren'
 "Vi eble por atenc' alvenis",
 Serpento sibilis kun koler':
 "Ni punas vin averte, pro danĝer'".
 "Ho, ne!" respondis Ŝaf' kaj morto ĝin forprenis.
 Por homo kun malbona kor',
 Sen amikec' kaj am-humor'
 La mondo estas fia nulo,
 Persono ĉiu — nur krimulo.



verkis **Ivan Andrejevich Krilov** (1769-1844) Rusio
 tradukis **Sergej Grigorjeviĉ Rublov** (1901-1979)
 Ukrainio

Analizo de menskuracisto Dro Frédéric Badel

sendis Roland Platteau el Francio

La 24a de decembro 2020

Observado kaj analizo de doktoro Frédéric Badel,
 mensokuracisto specialiginta pri posttraŭmata streso:



“La loĝantaro nun dividiĝas en du grupojn. La unua, heterogena, konsistas el **homoj favoraj al la vakcino**. Ĝi kunigas tiujn, kiuj pro konvinkiĝo aŭ laco, pretas submetiĝi al ĝi por eliri el la krizo. Ĝi estas tiel entenas homojn, influeblajn, kiuj kredas senhezite en la mesaĝo de la ondelsendoj. Ili restos akceptemaj al ĉiuj pridanĝeraj mesaĝoj kaj konsentos pri la metodo eliri el la krizo, eĉ se ĝi estas akompanata de daŭra senigo de iliaj rajtoj.

Ni ankaŭ trovas en ĉi tiu grupo homojn, kiuj detranĉis sin de ĉiuj informoj delonge, por protekti sin, kaj kiuj indiferentis pri iu ajn parolo. Por ili, la ĉefa afero estas ĉesi aŭdi pri la temo. Ili malkvalifikis ĉiujn recenzojn por neŭtraligi ilin. Tiel la filogilo de tiuj testoj

kondukantaj al epidemio de kazoj, sen mortoj nek malsanoj, ne plu atingas ilian komprenon, kvazaŭ iliaj cerboj estus malkonektitaj. Ilia prioritato estas ĉesigi la mistraktadon, kiun ili suferas, detranĉante sin de ĉia ĝeno.



La dua grupo kunigas la **kritikantojn de la vakcino**, tiujn, kiuj evitis la influon de amaskomunikiloj, kiuj ofte konsilis aŭ serĉis informojn ekster konvenciaj fontoj, restante sentemaj al la realo de sia medio (hospitalaj servoj ne saturitaj, nombro da mortoj kompareblaj al antaŭaj jaroj, neproporciaj rimedoj prenitaj, redukto de fundamentaj rajtoj sen pravigo, ktp.). Ĉi tiuj homoj ankaŭ rimarkis, ke vakcino ne esceptos sociajn distancigajn rimedojn kaj, sekve, ke kunvivado ne restariĝos, ke la registaro arbitre tenos kontrolon pri la loĝantaro kaj ĝiaj agadoj. Antaŭ ĉio ili observas la ĉiam pli kreskantan enmiksiĝon de la ŝtato en iliajn ĉiutagajn kaj privatajn vivojn.

Ĉi tiuj du grupoj nun estas apartigitaj per linio, kiu malfacile moviĝos. La manipulado montris limojn antaŭvideblajn kaj ĝi ne efikas al tiuj, kiujn ĝi malsukcese provis konvinki. Ĉi tiuj grupoj haltis, iliaj nombroj haltis, kaj sendepende de la argumentoj prezentitaj, la skandaloj establitaj aŭ la pruvoj prezentitaj, ili dronos en neforigebla nacia rakonto kiun estos malebla denunci krom esti nomata "konspir-teoriulo". La vortoj anstataŭos la realon kaj, uzataj malsence, ili perdos sian signifon kaj transdonos ideojn, kiuj rompas kun la faktoj.

La deĵorantaj potencoj eĉ povos konfesi siajn mensogojn, la homoj akلامos ilin, ne povante kredi ilin malbonintencaj kaj konvinkitaj, ke ili estas super suspekto. Tial ne plu estas tempo publikigi la rezultojn de studoj pruvantaj la efikecon de unu produkto, la mensogojn pri alia, produkti kurbojn montrantaj la etecan naturon de la sano-risko kaj la neproporciecon de la tim-reagoj. Surdeco kaj blindeco regas superaj ĉe homoj, kiuj, kondiĉitaj, estas senigitaj je juĝo kaj ne kapablas agnoski, ke objektivaj faktoj povas kontraŭdiri la realon, kiun ili konstruis.

Organizi konfrontigon inter ĉi tiuj du grupoj de la loĝantaro estas eventualo - nun ebla. Niaj gvidantoj konjekteble rapide ekprenos ĉi tion por kuraĝigi socian organizon, kiu starigas "bonajn" kaj "malbonajn" civitanojn unu kontraŭ la alia, sanaj, obeemaj, respondecaj kaj vakcinitaj homoj kaj toksaj, ribelemaj, malkonsekvencaj kaj ne vakcinitaj. Ĉi tiu sistemo de bonaj civitanoj ĉeestas en Ĉinio. Ĝi baziĝas sur denuncio kaj obeo al la regulo.

La bona uzo fare de la registaro de la gradigita submetiĝo de la homoj kondukas ĝis hodiaŭ al la akcepto de nenecesa vakcino, kies tokseco ne estas taksita, kaj por kiu la laboratorioj, konsiderante la rapidecon de produkta disvolviĝo, jam negocis ne respondi pri eblaj kromefikoj, igante ŝtatojn respondi al tiaj konsekvencoj. Kaj kial ne finfine ĉar politikistoj fariĝis kuracistoj.

Niaj regantoj kaj parlamentanoj, per sia potenco kaj influo, instigos tutan loĝantaron fari geston, kies intereso ne estis pruvita kaj kies konsekvencoj ne estis mezuritaj, kaj tiel sin prezentas kiel savantoj. Ĝi elvokas teknikojn de sektoj kaj la kolektivajn memmortigojn. Por eskapi la finon de la mondo aŭ de la eksterteranoj - ĉi tie la mortiga viruso - ofero estas prezentita kiel sava.

Sektoj uzas ĉi tiujn rimedojn: izoli individuojn fortranĉante ilin de siaj sociaj kaj familiaj ligoj, dependigi homojn senigante ilin de iliaj vivrimedoj, disvastigi unusolan diskurson martelitan en konstantaj amasajn kunvenoj, forpeli ajnan diverĝan penson, prezenti kontraŭulojn kiel plagojn, kiuj komprenas nek sian propran intereson nek la superan komunan intereson. "Ni kontraŭ la aliaj" estas ĝenerale la simpla doktrino komprenebla de ĉiuj ĉar ĝi estas simplisma, kaj bedaŭrinde adoptita.

La limŝtono estas transirita. Nun ke la disigaj linioj, kiuj dividas la loĝantaron, fariĝas pli klaraj, ĉi tiu registaro ne plu havas la eblon reveni al pli raciaj kaj proporciaj pozicioj. Li faris ĉion eblan en la kampo de manipulado, li mobilizis ĉiujn influkampojn, restante kredinda kun signifa parto de la loĝantaro. Por tiuj, kiuj, ribeluloj, rifuzas aliĝi, necesas aliaj pli trudaj metodoj.

La signoj de ĉi tiu totalisma drivo troviĝas en la uzitaj teknikoj pri cerbolavado, identaj al tiuj de la sektoj. Ili estis tie dekomence, sed kiel ni povas kredi, ke demokratie elektita registaro povas turni sin kontraŭ sia popolo?

Hodiaŭ parto de ĉi tiu popolo estas enprofundigita en malriĉecon, malordon, la "neesencaj" (1) komencas sinmortigi, psikiatria malordo multiĝas kaj ... la Scienca Konsilantaro (2) daŭre plenumas sian "meson" al la amaso de fideluloj halucinaj. Morgaŭ, ĉiu viruso, vera aŭ fikcia, denove povos semi teruron inter loĝantaroj pretaj vakciniĝi por konservi iom da libereco. Ili pretas por ĝi. Kaj se la nunaj testoj ankoraŭ estas uzataj - kontraŭ ĉia logiko - eĉ vakcinitaj populacioj estos pozitivaj kaj restos kontaĝaj! Distancigaj rimedoj restos la regulo. Plia signo de la trompo, la viroj feoj de la virusojn jam antaŭdiras la venontajn ondojn kaj iliajn datojn de komenco. Ĉiu scienco vere forlasis niajn sociojn. Ĉiuj sanzorgoj forestis de oficialaj decidoj.

La homaj konsekvencoj estas teruraj. Ĉiuj lokoj de kunvivado malaperis, homoj estas pli izolitaj ol iam ajn, ili suferas maljustajn rimedojn truditajn de manpleno da gvidantoj, sen ia ajn konsulto, sub la ŝajno de certigi sian sekurecon. Kio faras homojn, ilian kapablon ligiĝi, ilian bezonon ligiĝi kun aliaj, estas minacata. La ŝtofo de la socio disvolviĝis en la rimedoj truditaj de reĝimo freneziĝinta, sen kontrolo, disvolvante longtempan vojmapon malgraŭ ia konsidero pri la realo. La rimedoj prenitaj influas la sanon de la loĝantaro kaj mortigas. Ili estas kontraŭsanitaraj. La diktaturo moviĝas. Nia vivmaniero ja ŝanĝiĝis; la Covid estas nur la preteksto, la katalizilo. Ĉi tiu difekto en niaj vivkondiĉoj kaj la neproporciaj rimedoj por kontraŭbatali viruson kredigas la diskurson de tiuj, kiuj vidas ĝin kiel la rimedon por establi novan mondan ordon, kiu devas detruiri nian privatecon kaj niajn individuajn rajtojn. La unuaj observoj montras la signojn de la realigo de ĉi tiu nova ordo. "

(1) *aludo al la dekreto ordoninta la fermon de ĉiuj komercejoj «ne esencaj», ekzemple verstovendejoj, ktp.*

(2) *«Scienca Konsilantaro» estas grupo kreita de la franca registaro en la komenco de la epidemo, ĝi konsistas, parenteze, precipe el personoj, kiuj havas fortajn*

tradukis kaj sendis **Roland Platteau** el Francio

Fonto: <https://www.le-journal-catalan.com/pro-ou-anti-vaccin-lavis-du-psychiatre-frederic-badel/86849/>

Problemo

Nomiĝas tiel vico da operacioj matematikaj, kiuj komenciĝis de vera fakto sed dumvoje oni malrespektas iun matematikan regulon, do sekve oni ricevas falsan fakton. Jen formularo:

$$b=a$$

$$ab=a^2$$

$$ab-b^2=a^2-b^2$$

$$b(a-b)=(a+b)(a-b)$$

$$b=a+b$$

$$b=b+b$$

$$b=2b$$

$$1=2$$

Solvo

Ni faru ekzemplon:

$$20-20=25-25$$

$$(4 \times 5) - (4 \times 5) = (5 \times 5) - (5 \times 5)$$

$$4(5-5) = 5(5-5)$$

$$4=5$$

$$2+2=5 \text{ (?!)}$$


**Kie estas la eraro?**

En la supra ekzerco estas evidente, ke oni malrespektis la regulon, kiu malpermesas la dividon per nulo (inter la tria kaj kvara linioj)...

Astrologio kontraŭ Psikologio - Aprilo / Virŝafuloj

Ni finos kun la virŝafuloj...

Laŭ la astrologiistoj la naskiĝintoj de ĉiu zodiaka signo havas karakteron propran je tiu signo. Jen laŭ ili la personeco de la « virŝafuloj »



Viroj :

Korpo kaj sano

La virŝafulo paŝas rapide, li parolas rapide, en kurta, hakita maniero, lia rigardo estas rekta, li neniam fortunatas la kapon alparolante iun. La esprimsulkoj estas markitaj, la okuloj kavaj, li elradias energion, forton, vivecon. Kaj efektive li ŝatas la riskon, kaj rapidon, spitas la doloron. Tial malmutas tiuj, kiuj kapablas sekvi lian ritmon. Sed ankaŭ lavundoj, cikatroj akcidentoj multas ĉe li.

Kiel li reagas ?

Mense li estas estaĵo volema kaj kuraĝa. Li neniam agnoskas sin venkita, aŭ mortas pro tio. Li ne trompas, igas lin vundebla lia sincereco.



Sed li havas „la koron sur la mano“, kaj por siaj amikoj li kapablas ĉion riski.

Lia kulto de la vireco ludas al li foje problemojn, logante lina al agoj senpripensaj.

Je kio li taŭgas ?

Lin altiras la profesioj batalemaj, aŭ estri entreprenojn.

Tiu kreanto ŝatas eligi sur la tero tion, kion ekzistas ne jam. Tiu noviganto ne bedaŭras iun ajn oferon. Kiam li fiaskas, estas ĉar li haltis dumvoje, preferante semi ol plenumi, aŭ pro manko da pacienco.

Kiel li amas ?

Li estas tiom varma kaj malavara, ke la elektitino sentas sin amata, sed se ŝi ne sekvas, elĉerpita. Li emas decidi por ŝi, trudi siajn gustojn, siajn ideojn, sian kapricojn, kaj tion bonfide, li eĉ ne dubas ke tiuj ne povus ne plaĉi al ŝi ! Por oponi lin oni bezonas uzi subtilecon, aŭ ruzon ! Kaj ĉar li estas granda naivulo, tio ĝenerale sukcesas.

Virinoj :**Korpo kaj sano**

La vizaĝo ofte estas longa kaj ovala, la vangostoj >>>

Mesaĝo de Kristo, Muhamedo...

Mi ne scias ĉu mi en sonĝo
 aŭ vere, de kelkiu pado
 malfermita en la ĉielo
 kvazaŭ ia diina beno
 sur la luma vindaĵo
 alportanta spiritan kvieton
 du anĝeloj navigantaj
 kvazaŭ venis en ĉi mondon
 frenezan kaj misuzitan
 pro impertinentoj, por savi ĝin.

Kvankam jam vesperiĝis
 kaj kozo en ombro degelis
 el supro, kiml lumo venis
 per magia inspiro ĝi varmigis
 tiun lacan pejzaĝon
 pro anksio kaj fieco.

Jen, antaŭ mi du anĝeloj..
 De kie tiu inspiro venis
 en vespera aero kaj digestis
 ĉi tiun reton da kruelaĵoj, humilaĵoj
 en la mondo kun mizeroj, difektoj?!

Ambaŭ, vere tiel ĉarmaj
 Kvazaŭ mi delonge ilin konis
 Unu kun densaj haroj (longaj)
 bela, ĉarma, kiel Kristo
 alia kun kurtaj haroj, bela
 Kiu do Li estis?!

Frato, Muhamedo- longharulo diris
 per tristaj okuloj, lumplenaj
 - komuna maltrankvilo, denove

en nian mondon nin venigis
 kiu neniam trankvilon trovis
 - Frato Kristo- aliulo diris
 (kompreneble profeto Muhamedo
 estis
 Maltrankvilo sur bela vizagxo)
 - Niaj nomoj, tiel multe
 estas ja misuzitaj
 En nia malsana mondo!

- Ĝuste, per ambaŭ niaj nomoj
 du plej grandaj religioj
 estas jam fonditaj.
 Tion neniu el ni
 de siaj adorantoj ne postulis.

- Prave, ni Dio ne estis
 Ĉe homoj ni alportis
 Nur ties sanktan vorton
 kaj nuk tion ni kondukis.

- Ĉu ni mem ne naskiĝis
 kiel miliardoj da aliaj
 en certa tempo?!
 Dio estas unu, tutegala por ĉiuj
 en tempo kaj spaco, ne limigita

-Finu do trouzado!
 Sub niaj nomoj
 okazis krucvojiroj
 per propagando kaj pompo
 mortiĝis miliardoj
 pro intereso de fortuloj
 sango elverŝiĝis kun abundo.
 landojn oni okupadis


Kaj sciulojn fajrbruligis
 teruraj genocidoj okazis
 Kaj kulturoj jam pereis
 Pro falsaj konfesioj



Homaro do havu
 Ununuran religion
 Tiun de fido al Dio
 kun ties diina mesaĝo:
 homon en mondo mi kreis
 ĉiu naskito, sanktulo estis!

Niaj spiritoj ne trovos
 pacon kaj kvieton
 ĝiskiam ĉe la homoj
 ne ekzistu bonkomprenemo.
 Kun Biblio kaj Kurano
 brakĉebrake kiel frato
 kiu scias al kiu ĉielo
 ili kune forflugas
 postlasinte ĉi mesaĝon
 por ĉi tiu perturbita mondo.

Tirana, 18.10.2015



>>> elstaraj, la frunto alta. La distanco inter le supera lipo kaj la nazo ofte tre longa, la mentono forta. La rigaro estas sincera kaj milda, pli milda ol tiu de la viro.

Kiel ŝi reagas ?

En la vivo ŝi kondutas kun rektanimeco kaj sendevjigecco. Ŝi kapablas fari multon por ĉiuj, kiujn ŝi amas. Pro orgojlo kaj ĉar si amas bravajn gestojn, ŝi ofte rifuzas venĝi sin, eĉ helpas siajn malamikojn, por pruvi al ili, ke ŝi valoras pli ol ili.

Je kio ŝi taŭgas ?

Ŝi estas el tiuj virinoj, kiujn la viraj profesioj ne fortimigas. La profesioj malegoismaj ofte allogas ŝin,

tial ke ili respondas al ŝia arda bezono de sindediĉo.,

Kiel ŝi amas ?

Ŝi estas pasia, kiel la viro de l'signo. Sed ŝiaj sentoj estas pli profundaj kaj pli daŭraj. Kiam ŝi sin donacis al iu viro, ŝi fine vivas per li, esperi, respiri, sopiri tra li.

(fino)

tradukis kaj sendis **Roland Platteau** el Francio

Mia penso similas al klingo
gutiganta
la sangon el apopleksia korpo.

Mia penso penetras la dolor-suferon
spertitan de blinduloj kaj surduloj.

Mia penso similas al animo
envolvita
per filamento en fertila menso.

Mia penso similas al elemento
turmentanta la molekulojn.

Mia menso similas al elektronika
horloĝ-montrilo
kiu, aŭdita en la mallumo,
sentiĝas vibri en la

piramidoj de la menso
torturita de la nebuloj kaj laceco
de l'sama penso.

Jimmy Buhagiar ¹

tradukita el la malta de
Carmel Mallia



¹ Malta poeto
(1960-2016). Lia
postmorta
poemaro titoliĝas:
"Miaj pensoj kaj
Amo" (2017).



Versojn oni ne aĉetas

poemo de Kálmán Kalocsay el Hungario

Ĉu libera vers' aŭ stanco,
Blanka vers' aŭ rimokulto,
Pura rim' aŭ asonanco:
Sama estas la rezulto.
ĉiu ĉie ĝin ripetas:
Versojn oni ne aĉetas.


Versojn oni ne aĉetas.
Jen la Nepra, jen la Vero:
Versojn oni ne aĉetas.
ĉirpas jam eĉ la pasero.
Vane la poet' poetas.
Versojn oni ne aĉetas.

Do, ne fantaziu vante
Pri l' potenc' de via arto,
Presu tekston Esperante
Por bildflanko de poŝtkarto,
Ĉiujn vendos vi, mi vetas.
Versojn oni ne aĉetas.

Pri la verda stel' ne odu,
Tio estas vanaj klukoj,
Ĝin surpentru aŭ surbrodu
En angulon de poŝtukoj.
Bonan gajnon mi profetas.
Versojn oni ne aĉetas.

Versoj estas kvazaŭ fumo.
Oni havas ja rimedon
Havi fumon per monsumo:
Esperantan cigaredon:
Oni en la buŝon metas:
Versojn oni ne aĉetas.

poemo de **Kálmán
Kalocsay** el Hungario



Kálmán KALOCSAY (naskiĝis la 6-an de oktobro 1891 en Abaújszántó, mortis la 27-an de februaro 1976 en Budapeŝto) estis hungara Esperanta poeto, tradukisto, kaj redaktoro kiu multe influis la evoluon de Esperanto-literaturo kaj de la lingvo mem. Lia nomo estas ofte esperantigita kiel Kolomano.

Kalocsay studis medicinon kaj poste fariĝis la ĉefa infektologo ĉe grava Budapeŝta hospitalo. Onidire li lernis kaj Esperanton kaj Idon adoleske sed ekkliniĝis al la unua kiam li vidis pli grandan potencialon literaturan. En 1921, oni eldonis lian unuan originalan volumon poezian, *Mondo kaj Koro*. Plia jardeko pasis antaŭ la apero de lia kolekto *Streĉita Kordo*, kiun oni konsideras unu el la plej elstaraj kolektoj de originala poezio en Esperanto. Ankaŭ aperis *Rimportretoj* – spritaj rondelformaj poemoj pri pluraj tiamaj movadaj gravuloj. Plejmultaj pensas, ke li ankaŭ estis la verkinto de *Sekretaj Sonetoj* (erotika sonetaro) sub pseŭdonimo Peter Peneter.

Kalocsay gvidis la literaturan mondon de Esperanto pere de la revuo kaj eldonejo nomitaj *Literatura Mondo*. Kaj tiu grupo de verkistoj, kiuj formiĝis ĉirkaŭ la revuo dum la dudekaj kaj tridekaj jaroj, nomiĝis la Budapeŝta skolo.

La verkoj de Kalocsay pri literatura kaj lingvisma teorio inkludas la ampleksan verkon *Plena Gramatiko de Esperanto*, kaj *Parnasa Gvidlibro*, ellaboritajn kun Gastono Varingjeno, kaj la pristilan gvidlibron *Lingvo Stilo Formo*.

Kalocsay kunverkis la du-voluman *Enciklopedio de Esperanto*.

Pri Kalocsay multe verkis kaj prizorgis lian postlasaĵon Ada Csiszár, post kies morto la postlasaĵo transiris al la Esperantomuzeo de la Aŭstruja Nacia Biblioteko.



*Karbodesegnaĵo sur kremkolora papero,
30 cm x 40 cm, 1988*



grundon. Super la maldekstra oblikva muro videblas alkonstruaĵo kaj malantaŭ de tiu la danĝere oblikva duobla kamentubo. La atesto pri urĝeco de la kamenpurigisto ne utilis al mi por la akiro de la necesaj brikoj ĉe la subdistrikta konstruoficejo. La tegmento estas pli malalta kompare kun la tegmento de la dekstra najbaro. La folioj de la alta betulo de la maldekstra najbaro daŭre obstrukadas la tegmentodefluilojn de banejo kaj alkonstruaĵo. Poste li dehakigis ĝin, per tio ankaŭ tiu problemo solviĝis.

En la korto troviĝas malnovaj staloj. Iam tiuj supozeble estis uzataj por kamparana bredado. La porkan stalon ĉe la alkonstruaĵo mi malkonstruigis. La stalo maldekstre en lamalnova trabofaka konstruaĵo estas pavimita per rondŝtonoj. Sub la herbejo en la ĝardeno mi ankaŭ trovis tiun pavimon, kiu kondukis el la stalo kiel strato. Maldekstraflanke antaŭ la oblikva muro mi desegnis la aĝan viton ĉe la malnova kalandrejo de la najbara familio Markgraf. La malhelruĝ-nigraj vinberoj ege bongustas kaj kreskis nekredinde vaste en la korton kun superabunda rikoltaĵo, kiu grandparte estas por fordonaci.

En mia desegnaĵo mia Esperanto-amikino sinjorino Ino Kolbe el Lepsigo staras videble en la domopordo al la korto. Ŝi vizitis min ofte kaj volonte por 1 ĝis 2 semajnoj. Nin ligis tre speciala amikeco per la internacia lingvo Esperanto. Tio estas alia historio.

La malnova domo estis tiom difektita, ke la antaŭa posedantino sinjorino Friebe serĉis aĉetanton dum tuta jaro. La libro de la domo havas sian fonton en la jaro 1908, sed la domo mem estas konsiderinde pli aĝa. Tion atestas la kelo kun rondarkoj kaj la grundmuroj el kampoŝtonoj. En la kelo ankoraŭ troviĝis malnovaj karbobrikoj kaj malnovegaj polvokovritaj vinboteloj.

En la subtegmentejo kun la grandaj vinkorboj, kiuj jam disfalis pro tuŝo, mi devis forigi rubaĵojn trifoje per la plej grandaj rubujoj.

Mi ĝoje laboregis por mia ŝatataj domo kaj parcelo en grandeco de 679 m². La larĝeco de la parcelo nur estis 9 m de la domo ĝis 7 m en la ĝardeno, - kvazaŭ mallarĝa hoso kontraste kun la pli grandaj najbaraj parceloj. La 40 m longa ĝardeno ne estas granda, sed tre alta, mi ŝercas. En mia maljuneco mi pagas helpantojn por la plej necesa ĝardenlaboro por flegado je flegogrado 3. Bedaŭrinde en la maljuneco nenio plu funkcias kiel antaŭe.

Postparolo

Dum GDR-tempo apenaŭ akireblis bona

Por mia pentrado mi revis pri domo kun ateliero. Mi serĉis kaj trovis la realigon de mia revo. En la jaro 1988 mi aĉetis mian domon en la Friedrich-Ebert-Straße. 9 por 10.000 GDR-markoj.

4.000 markojn mi gajnis per diligentega pentrado de menditaj portretoj, kopioj de Malnovaj Majstroj kaj olea pentraĵo de rusa pejzaĝpentristo Ŝiŝkin el mia ŝatata libro pri arbtildoj.

La mankantajn 6.000 markojn donacis al mi mia malnova saĝa amikino Grete Berger-Falk, sen ŝuldatesto aŭ iuj ajn devoligoj kun la vortoj: „Helga, vi havas tian talenton, al vi oni devas helpi!“ Ŝi havas lokon en mia koro por ĉiam! Ŝi helpis al mi finance kaj materiale per antikvaj mebloj por la provizado kaj per artaj konsiloj. La reston de la konstrukredito por la necesa alikonstruado mi baldaŭ repagis per laboro en laborhaviga aranĝo (ABM) kaj diligenta pentrado de menditaj portretoj. Mi neniam volis esti sekvestrita kiel la fama pentristo Rembrandt.

La domo troviĝas en la centro de mia hejmurbo Gräfenhainichen kaj havas vendejon kun 2 montrofenestroj kaj pordo kun supra fenestreto, donanta la necesan lumon por la pentrado. Ĉi tie estas mia ateliero, mia laborĉambro kun bildgalerio samloke, kie mi feliĉas en mia medio.

Inspirita de la malnova parcelo mi rapide kaj starante kreis karbodesegnaĵon, rigardante de la ĝardeno al korto kaj domo. La malnova muro, kiu apartigis la ĝardenon de la korto, staris oblikve. Ĉe la muro staris grandaĝa sambukarbo, kiu ĝojigis min kaj kiu apogis sin al ĝi. La postajn berojn prenis la birdoj, kiuj kakis blue sur la freŝlavitan tolaĵon de la ĉagrenita najbarino. Por eviti eventualan ĉagrenon, la arbo bedaŭrinde devis esti forigita.

La dekstra alta arbo sur la najbara parcelo pli poste fariĝis viktimo de ŝtormo kaj falis parte sur mian

konstrumaterialo. Por la novkonstruado de tiu ĉi kamentubo oni vendis al mi, kiu ne supozis malbonon, netaŭgajn blanke effloreskintajn brikojn kaj dumpis tiujn ĉe la trotuaro antaŭ la domo. Mi pene kaj sen helpo portadis la ŝtonojn tra la 10 m longa koridoro en la korton.

La konstruĝeniero de la urbo diris al mi: „Sinjorino Plötner, kial vi nur aĉetis tiun ĉi domon, la posedantino sinjorino Friebel serĉis aĉetanton tutan jaron!!!“ Kaj post kelkaj jaroj li diris: „Ja vi povas esti dankema, ke vi havas tiun domon nun!“ Ho, mi estas!!!

Mi ŝatas la domon kun la ateliero kun miaj bildoj, la koridora galerio, la korto kun florbedo, la angulo por sidiĝi kun la papiliarbo, la papilioj kaj birdoj, la paradiza ĝardeno kun la floroj, kiujn mi same volonte pentradas. Kaj mi ŝatas la ruĝajn, verdajn kaj nigrajn berojn, la juglandojn, vinberojn kaj pomojn. Kelkajn florojn, arbojn kaj arbustojn mi mem plantis. Pri 600 tulipoj mi tre fieras. Praaĝa angla odoranta rozo kreskadas alte super la pomarbo al la lumo.

Mia tre spontanea rapida desegnaĵo ankoraŭ montras la originalecon de la parcelo. Ligna ŝovopordego baldaŭ anstataŭis tiun oblikvan muron. Post la tielnomata politika ŝanĝiĝo mi per konstrukredito kapablis financi la necesan novan ŝindotegmenton, la duoblan kamentubon kaj aliajn plej urĝajn aferojn. Iom post iom mi sukcesis organizi la plej necesajn aferojn por loĝado. En la ateliero dum desegnado kaj pentrado kaj dum la instruado de pentrado mi sentas plej bone kaj plej ĝuste, malgraŭ ĉiuj sanproblemoj en rulseĝo dum maljuneco. Ja eblas, ke mi tro multe laboris en la ateliero, en la domo kaj ĝardeno. Proverbe dirite mi donis sakon kaj animon al la pentrado. Pro tio mi bezonis tiun ĉi domon. Kion oni faras, indifere kion, oni faru tutanime. Tion mi ĉiam diris al miaj lernantaj staĝantoj en la ateliero. Kaj: SIMPLE EKU! PER LA TASKO KRESKAS LA HOMO!

verkis kaj sendis **Helpa Plötner** el Germanio

Mirinda renkonto (6/10)

(sesa parto)

Petro kaj Jana trovas novajn amikojn

Someraj tagoj plilongiĝis. La vetero estis bela ĉar matenoj estis mildaj, tagmezoj tre varmaj sed posttagmeze kaj vespere oni povis senti ian varmfreŝan ondon kaj kiel nokto profundiĝis tiel aero fariĝis pli kaj pli freŝa. Tiun prokrastitan someron oni alnomis Miholja somero. Do, laŭmonate estas Oktobro en ĝia unua duono.

Sur verda herbejo Sara sidis jam longe. Ŝiaj manoj estis sub ŝia kapo anstataŭigante kusenon. Ŝia longa jupo estis malpuroverda pli malhela ol helverda. Ŝiaj someraj botetoj estis nigraj enplektitaj per ŝnuroj. La blanka bluzo estis kovrita per mielkolora jako. Sara estis juna fraŭlino kies bluaj okuloj rigardis malgaje. Venteto milde karesis ŝian helbrunan hararon.

- Mi ne scias kiel okazis, ke mi solas - ekpensis ŝi kaj laŭte diris. -Vidu, mia ora fiŝeto, vi estas mia maskoto, ĉio restinta de mia fora amikino, Dominik. Mi ne eltenos plu tiun solecon. La grandaj bluaj okuloj pleniĝis je larmoj. - Se mi havus novajn amikojn kun kiuj mi ludus kaj pri kiuj mi zorgus ...

Subite la fiŝeto eksaltis el ŝiaj manoj kaj ŝi povis aŭdi kiel ĝi proponis al ŝi ĉi tion - Kara Sara, ne estu malgaja. Mi ne estas simpla ora fiŝeto. Mi vere estas ora fiŝeto kaj via deziroj al mi estas ordonoj. Diru vian deziron laŭte. Nur estu atenta ĉar mi plenumigas nur unu deziron !

Unue, povra Sara ne povis kredi, ke tiu fiŝeto

verkis kaj sendis Miriĉ Jadranka el Serbio

parolis kun ŝi ! Ĉu ŝi estis tro longe sub la suno? – Ho, ne mi sonĝas! Ŝi fingre pikis siajn vangojn, eltiris siajn orelojn sed la fiŝeto estis tie alparolata al ŝi - Ne timu, Sara, diru vian deziron laŭte!

Dirite farite.

Sara mire staris meze de la valo apud, kiu troviĝis lazura lageto. Malantaŭ ŝi troviĝis ligna domo ĉirkaŭata de fruktoĝardeno. Bonodoroj de la fruktoj piroj, prunoj, kaj cedonioj rapide konvinkigis ŝin, ke ĉio estis reala. Rapide ŝi rekonsciiĝis.


La ora fiŝeto saltetis gaje el kaj en la lagon. Sara sentis, ke ŝi komencis ŝviti. - Mi apenaŭ kredas.... Vi ne estas falsa ora fiŝeto! diris ŝi ride.

Subite ŝia rigardo direktiĝis al la mallarĝa vojo sur kiu gaje paŝadis tri ursoj. Sur la ŝultro de la plej forta kaj alta urso staris blua papago. Ĝia kolo estis kolorita kiel ĉielarko kun granda ruĝa silka maŝo. La unua plej alta kaj maljuna urso estis vestita kvazaŭ ĝi estis ia estro altranga.

La dua urso estis pli juna kaj ĝi kaj la tria urseto aspektis kiel ili kune fuĝis el iu cirko. Eĉ ili aspektis amuze. Eble tian aspekton donis al ili la grandaj okulvitroj portataj de la urseto dum la dua urso havis kostumon kvazaŭ li estis laboranta en cirko.

- Miaj piedoj rifuzis min plu porti. Ni devas sidiĝi kaj bone ripozi - grumblis la plej maljuna urso. La plej juna urseto nenion diris nur lace falis sur la genuojn.

Sara scivole rigardis ilin. Ŝia koro forte batis - Ja.... jen novaj amikoj ! Mi estus feliĉa se vi akceptus min kiel via amikino - diris ŝi unuvoĉe etendiĝante la



manojn al la plej maljuna urso.

- Bonvenon en mia nova domo. Eniru ni dometon kaj poste vi ripozu iomete - diris Sara pli serioze ol ŝi aspektis.

Sed la dua, t.e. la meza Urso staris kvazaŭ ĝiaj piedoj enradikiĝis en la tero. Lia kostumo blukolorita kun flava silka maŝo bele ornamis ĝian brunan felon. Sara maltrankvile iris tien alien.

Tiam ĉiuj turniĝis al la maljuna Urso. La papago ekflugis de sur ĝia ŝultro surteriĝante sur la malnovan mezgrandan puton troviĝanta dekstre de la ligna domo.

- Jen, ni havas puton, ni havas akvon ! Hura ni ne plu estos soifaj. Ni havas lageton kaj tre belan fruktoĝardenon. Piroj estas viaj favorataj fruktoj, ĉu ne? demandis la papago al la ursoj.

- Jes, vi pravas - respondis la maljuna urso. Nia kara fraŭlino estu nia dommastrino kaj mi prizorgos pri miaj ursetoj eĉ pri vi, babilaĉa papago.

Ili ĉiuj rapide konsentis pri tio kaj pli rapide interkonsentis kion ili faru plue.

- Ĉi - tie estas frua aŭtuno - diris Sara kun zorgema vizaĝmieno daŭrigante - Do, ni rikoltu fruktojn, morgaŭ matene kaj nepre ni apartigu iom da fruktoj por vintroprovizo. Jes, ĉirkaŭ la lageteto estas sabla grundo. Ni devas kolekti la pirojn kaj cedoniojn kaj profunde ensablighi ilin...

La tria urseto estis malgaja pro malsato. - Kion ni manĝos nun? ĝi demandis ilin tre atente.

- Mi ne scias-respondis la fraŭlino Sara - Eble

estas io en la domo. Ni eniru interne kaj ni vidu ĉu estas io preparita por ni.

En la domo, en la kuirejo troviĝis granda tablo. Surtablighita estis manĝo en granda ujo vaporiĝanta bongusta supo, kiesodoro tre logis kaj la okulojn kaj buŝon. En eta ujo troviĝis manĝo por birdoj kaj meze de la tablo troviĝis ujo kun mielo por la ursoj. La kuirejo estis riĉe ekipita.

Tial ĉiuj estis kontentaj kaj kviete sidiĝis ĉe la tablo por manĝi. Tiam audiĝis bela sed tro laŭta melodio. Momente ekiĝis silento postkiam ĉiuj brue stariĝis elkurante eksteren.

Je ilia surprizo du junuloj kuregis etendiĝante la manojn al ili. Tiuj estis Jana kaj Petro. Ilin akompanis papilioj, kato, hundo kaj bruantaj pasaĝeroj.

- Jen, kiu uzas nian someran dometon. - diris unuvoĉe Jana kaj Petro,

- Bonvenon al nia bela komuna domo! Ni ne plu estos solaj!

Ekestis gaja bruado kaj ridoj sur ĉies lipoj. Sekvis interkona vespero.

Se vi ne kredas iru tien por konvinkiĝi! Kaj poste ni vidos. Ni sekvos aventurojn de niaj malnovaj amikoj Jana kaj Perto kaj nova amikino Sara kun ŝiaj tri amikoj, la ursoj kaj la belega blua papago.

(fino de la sesa parto)

verkis kaj sendis **Miriĉ Jadranka** el Serbio

Vilmos Benczik – konstruinto de kolonoj

-- el Libera Folio

Unu el la plej influaj kaj sagacaj esperantistoj hungaraj, kun efiko tutmonda, forpasis la 27-an de februaro en Budapeŝto.

Naskita je la fino de la dua mondmilito, Vilmos Benczik lernis Esperanton kiel adoleskulo kaj komencis publikigi jam 18-jara, kaj hungare kaj en Esperanto (en *Hungara Vivo* kaj *Norda Prismo*). Li kreis, kunkreis, redaktis, eldonis aŭ alimaniere prilaboris multajn el la kolonaj verkoj por kleriĝi pri nia literaturo.

Pedagogo dum sia tuta hungaria laborvivo (1969-2013), ekde baza ĝis altlernejo, li paralele aktivegis pri Esperanto, ĉef-emfaze inter 1974 kaj 1992. Tiu estis la periodo kiam, ĉe la moliĝanta diktaturo hungaria, multaj homoj ankoraŭ bezonis Esperanton por unikaj translimaj kontaktoj, dum la ŝtato diversgrade favoris esperantistan agadon.

Fruktuzante tiun historian ŝancon, Vilmos Benczik disvolvis unikan talenton organizan estrante la eldonagadon de Hungara Esperanto-Asocio ekde 1976 ĝis la komenco de la 1990-aj jaroj. En tiu periodo

aperis ne malpli ol 138

Esperantaj titoloj (Lorjak, Modest, Nemere, Szathmári, Tóth k.a.) en ĉirkaŭ 370 000

ekzempleroj, kaj, tre impone, ankaŭ 30 hungarlingvaj titoloj, kun aŭ sen rilato al Esperanto (1987-1990), en du milionoj da ekzempleroj.

Samtempe, sub lia redaktado (1977-1990) la revuo *Hungara Vivo* plivastigis sian temaron kaj atingis internacian prestiĝon foje komparatan eĉ al tiu de la samurba antaŭulo *Literatura Mondo*. Ĝi atingis dumil abonantojn, kies duono vivis en Sovetio.

Benczik verkis aŭ redaktis la baze gravajn verkojn *Libro de romanoj* (1979), *Tutmonda sonoro* (1981), *Hungara antologio* (1983), *Baza legolibro por komencantoj* (1986), *Urboranda nokto de Attila József*



(1986) kaj *Lingva arto* (1999).

Kiel literatura kritikisto, li kunigis eseojn en siaj influaj *Studoj pri la esperanta literaturo* (1980). Ankoraŭ ne sufiĉe konata restas lia *Pri la natureco kaj artefariteco de lingvoj kaj aliaj studoj* (2016).

En 1982-1986 Benczik ĉeforganizis en Budapeŝto teatran festivalon, kie prezentis sin krom Esperantaj trupoj ankaŭ konataj aktoroj hungaraj lernintaj Esperanton – aŭ almenaŭ sian tekston Esperante.

Liaj movadaj postenoj inkluzivis estraranecon de Hungara Esperanto-Asocio (1965-1967, 1978-1992, prezidanto en 1990-1992), komitatanecon (1980-1986) de UEA, prezidaton de la juĝkomisiono de Belartaj Konkursoj (1986-2002) kaj anecon en la Akademio de Esperanto (2001-).

Li estis Honora Membro de UEA. Inter 1979 kaj 1994 li faris ses prelegvojaĝojn en Finnlando, Japanio kaj Ĉinio.

Precipe junaĝe, li ankaŭ tradukis beletre, hungaren el la hispana kaj portugala, interalie verkojn de Borges, García Márquez kaj Vargas Llosa. Ekde la 1990-aj jaroj, lia hungara eldonejo Trezor publikigis helpverkojn por lernejoj, sed ankaŭ i.a. hungaran tradukon (2002) de *Maskerado* de Tivadar Soros.

István Ertl

Fonto: <https://www.liberafolio.org/2021/02/27/vilmos-benczik-konstruinto-de-kolonoj/>

Sur vojo de l'vivo

poemo de Edmond Privat

I	Plej pure ŝi ritmis laŭlonge la vojo.
Sur vojo de l'vivo vaginte tre sola Dum jaroj bruemaj de l'knaba juneco, Kaj multe plorinte sen vorto konsola Dum sonis ridad' el apuda gajeco,	Niajn rozojn ŝi disdonis Al lacegaj vojirantoj, Kaj infanoj ofte kronis Per kronetoj el diantoj.
Tagon mi renkontis voje La rigardon de princino, Tuŝis mian manon foje Dolĉa mano de fratino.	II
La manon mi kaptis kaj premis tremante. El miaj okuloj ŝi plorojn ĉesigis, Kaj sulkoj de l'frunto forigis kisante. Ni manon en mano la vojon daŭrigis.	Sur vojo de l'vivo nun vagas mi sola, Senzorge al kie la tempo min blovas ; Ĉar, kvankam min celus eĉ vorto konsola, En aĝ' mia nuna mi vivi ne povas.
Blue brilis la ĉielo ; Ĉie floris la ĝardenoj. Por la haroj de l'anĝelo Kreskis rozoj kaj jasmenoj.	Haltis mia koro voje Ĉe la tombo de l'princino, Kiu donis al mi foje Dolĉan manon de fratino.
Sur vojo de l'vivo nun dolĉa kaj bela Ni, kvazaŭ du cignoj sur blua rivero, Malpeze glitadis al revo ĉiela, Dum harpoj kantadis pri l'ama mistero.	La tagon, en kiu ŝi haltis kun larmo Kaj blankan la manon forŝiris el mia, Mi kial ne povis en morta malvarmo Ŝin sekvi sub teron al tombo glacia ?
Pura ŝajnis tuta mondo, Bona ĉiu, bela ĉio. Ĉirkaŭ ni dancadis rondo De petaloj el lilio.	For de l'tomb' en nuna horo, Min disrompas per tirado Malantaŭen rememoro Kaj antaŭen plu-vivado.
Ni revon mirindan komencis sen limo Pri lando eterna de paco kaj ĝojo ; Kaj kanton de nia komuna animo	Sur vojo de l'vivo, pro kia mistero Eĉ amo nur estas pruntaĵo momenta ? Ĉielon ni trovas kaj perdas sur tero, Kaj blovas ankoraŭ la tempo turmenta.

>>31

Ŝercoj



ESENCA

Kruko pretas foriri al la laborejo, kiam Jozefino alparolas lin.

Jozefino: Ne forgesu ke Joĉjo ludos en la Jarfina Spektaklo de la lernejo, hodiaŭ post la klasoj.

Kruko: Sed mi ankoraŭ estos en la laborejo.

Jozefino: Ho, certe vi povos forlasi la laboron iomete frue, ĉu ne? Vi ne estas tiom esenca al la laborejo, ĉu?

Kruko: Vi tute pravas, kompreneble. Sed... mi ne volas ke la estro sciui tion!

FLOROJ POR ĈIU OKAZO

Kruko eniras florbutikon: Mi bezonas kelkajn florojn por mia edzino.

Floristo: Ni havas florojn por ĉiu okazo.

Kruko: Bone.

Floristo: Kion vi do misfaris?

PUŜLEVOJ

Baniko: Mi komencis fari sport-ekzercadon ĉiumatene.

Kruko: Ĉu vere? Mi gratulas.

Baniko: Post dudek tagoj, mi sukcesis fari kvardek puŝlevojn hodiaŭ matene.

Kruko: He ja, ĉu vere kvardek?

Baniko: Nu, tio estas po du ĉiutage....

tradukis **Rikardo Cash** el Francio
publikigita kun lia permeso

Fonto: esperanto-anekdotoj@googlegroups.com




Silaba Krucvortenigmo



Skribu silabon en ĉiu kvadrato. Jen estas listo de bezonataj silaboj:

AD, BA, BE, DO, ĜAN, ĜO, ĜU, KA, KO, LE, LO, LO, MAL, ME, MO, NO, NO, O, RIA, RO, RU, SA, STO, TA, TI, VI.



HORIZONTALAJ DIFINOJ (→)

1. Meti objekton al pli malalta nivelo; 3. Rilata al la maro inter la Balkania kaj la Italia duoninsuloj; 6. Kapablo ĝuste juĝi; 7. Meblo, atinganta la alton de la brusto; 8. Fiŝo, simila al ezoko; 9. Kovru per maldika tavolo de oro! 10. Tuto de la loĝantoj; 11. Al malsaĝulo ne helpas admono, nur ___ (Zamenhof).

VERTIKALAJ DIFINOJ (↓)

1. Al ___ ne helpas admono, nur bastono; 2. Regulo, juro; 3. Al malsaĝulo ne helpas ___, nur bastono; 4. Ĉefurbo de Saud-Arabio; 5. Monto en Ekvatora Afriko; 7. Ruĝo aŭ nigro; 8. La litero β; 9. Malmola organo de la vertebruloj.

Fonto: Semajno de Enigmoj #7

<http://www.semajnodeenigmoj.com>

(La solvo troviĝas en la antaŭlasta paĝo)

Dum la lastaj dekkvin jaroj la gastoj de la bulgara metropolo kaj la ĉefurbanoj mem-sendube rimarkis tre belan decidon de la urbestro aranĝi kaj plibeligi arte la eksteraĵon de la urbo. Apud kaj ĉe lokoj kiuj allogas kaj kunvenigas amase homojn elkreskis kaj instaligis speciale konvenaj arte preparitaj kadroj sur kiuj fikseblas grandaj fotoĵoj. La Ponto de la Amiĝitaj ĉe NDK estas tutjara ekspozicejo subĉiela – oni aranĝas ekspoziciojn pri famaj novekonstruitaj domoj, oficblokoj, infanĝardenoj, lernejoj, universitatoj, ĝardenoj, parkoj, amuzejoj, kie estas kolektataj de diversaj kulturaj, sportaj, teknikaj kaj aliaj sloganoj.



La Virina Merkato - la plej granda merkato de Sofio – allogas milojn da aĉetantoj, infanoj, aĝuloj kaj pli junaj ofte kaj eksterlandanoj. Krom aĉeti diversajn produktojn kaj legomojn laŭlonge de la stratetoj la homoj kun granda intereso rigardas grandajn fotoĵojn de vendistoj kaj aĉetantoj el la tempo de 19, 20-a jarcentoj, kiuj estas vestitaj kun popolkostumoj, aŭ kun jam modernaj siatempe europecaj vestoj, videblas tiamaj pesiloj, bestoj, legomoj, homoj el diversaj etnoj – ciganoj, turkoj, hebreoj. Tre interesaj momentoj de la historia, moda kaj kultura vivo de nia ĉefurbo Sofio!

Sendube uno el la plej magnetaj allogiloj de sofianoj estas la ĝardeno kaj la placeto antaŭ la Popola Teatro “Ivan Vazov”. La muntitaj arte belkadraĵoj prezentantaj fotoĵojn el la diversaj spektakloj de koncertoj, teatroj, operoj kaj operetoj, muzik konkursoj

kaj festivaloj vere distras la promenantojn kaj preterpasantojn. Tie krome oni povas trinki kafon aŭ bieron, dum interparolo kun sia simpatia amik(in)o kaj komentarioj emocie la ekspoziciitajn kun informoj belfotoĵojn. Kia ĝuaplena allogaĵo, kaj certe spirita nutraĵo kaj intelekta pliriĉigo.



Antaŭ kelkaj tagoj mi veturis per aŭtobuso №213 al Centra Stacidomo-Sofio laŭ la centra bulvarado “Danail Nikolaev”. La bulvarado estas ŝirmita kontraŭ la bruego de la najbara fervojtrafiko per grandaj vertikalaj (2/3m.) bariloj. Por plibeligi la situon por la okuloj de la laŭlonge preterveturantoj kaj irantoj, la komunumaj sofiaj specialistoj alpaŝis eble plej mirindan aranĝon-algluo de grandegaj artfotoĵoj de olda Sofio kun klarigoj!

Gapante la belan vicon de ĉarmaj fotoĵoj mian vidon neatendite ekscitis fotego sur kies randoj sube kaj dekstre estis manuskripto?! Ŝajne mi tralegis: Mia adreso...?! Mi eksaltis pro ekmiro, sed la aŭtobuso foriris!! Post la fino de mia laboro, tuj mi revenis ĝis la plej proksima de la vidita fotoĵo haltejo! Ho, Dio! Mia koro esperantista ekbatis freneze! La okuloj miaj ne mensogis min. Okulfrape la fotoĵo estas reproduktaĵo de poŝtkarto de la komencaj jaroj de dudeka jarcento de Olda Sofio!! Ĝi estis sendita de bulgara esperantisto – s-ro Neĵĉo Ĵelev kun “mia adreso” kaj petis la adresaton saluti la esperantistojn en Peterburgo... La tiama poŝtkarto montras tramon ĉe angulo de bulvarado Dondukoff je la fono de belstilaj domoj en Olda Sofio. Kia bela pruvo pri la disvolvo de la Esperanto – movado en Bulgario kaj ĝia rolo en la internaciaj kontaktoj de la scivolema bulgara gento! Mia ĝojo gluglis embruste kaj mi ŝatis disdividi ĝin kun la ceteraj gesamideanoj! Grandplezure mi faris foton antaŭ ĉi tiu mirinda trovaĵo kun mia nepino Karina kiu tenas revuon Monaton!

verkis kaj sendis **Petar Todorov** el Sofio, Bulgario

Staseo estas malnova esperantisto, tamen eterna komencanto kaj mi diris al li :

- Esperanton finlerni vi ne volas. Fakto.

Dum la kunvenoj vi krokodilas, veteranojn vi ignoras. Esperanto-movadon vi kompromitas! Do kio vi estas? La absceso sur la nazo - kaj nur. Vi estas absceso por ĉiuj!

Mi rimarkis, kiel li profunde kaj sencohave ekcerbumis. Poste ĝentile, ne ofendiĝante kaj min ne ofendigante, per voĉtono gardante necesan distancon, li diris :

- Vidu, kio iam okazas. La vivo de la homo efektivigas tragike: ne atendite vi fariĝas al ĉiuj la absceso.

- Do jen, - mi diras, - bedaŭrinde, tamen estas fakto.

Iom da tempo ni ambaŭ silentis. Poste li ree ĝentile, ne levigante tonon, ekdemandis:

- Do, kion ni faros?

- Pri kio vi... ? - ne komprenis mi.

- Pri mi, - diras li. - Tutegale la afero estas serioza.

- Kia do afero ĝi estas? - diras mi. - Vi estas vi. Se vi komprenas, ke vi estas kulpa, do vi pliboniĝu.

- Vi diras „pliboniĝu“ - lante lekciis li. - Komprenable, teorie jes. Tamen praktike en la vivo ne estas tiel facile efektivebla. Oni asertas, ke deziro esti bona spontane ne venas. Ĝin oni devas stimuli, inspiri. Post la eta paŭzo li aldonis.

- Helpo necesas. La subteno. Do, ni diru, vi ligu al mi spertan samideanon...

- Kio sekvas el tio? - mi demandas.

- Eĉ lia sola personeco min instigus. Vidante apude la spertulon, eble mi ekcerbumus...

- Eble... - komencis dubi mi.

- Enuigas min senfinaj kunsidoj, „universitatoj“ kaj „libera tribuno“ - daŭrigas li.

- Komprenable, - mi diras - ŝajne vi iom pravas.

- Ĉu ne indus, - jam pli severe li komencis eldiri siajn pensojn, - ke vi ekpensu pri la diverseco de la kluba programo, nova labormetodiko

Mi kuntiriĝis aŭdinte tion, sed li daŭrigis kuraĝe plu:

- Aŭ, ni diru, la krokodilado... Komprenable la fenomeno estas negativa, mallaŭdinda, sed ne evitebla. Vi ja mem ankaŭ fojfoje krokodilas. Pro kio do vi tuj kritikis min, insultas?

- Okazas... - konfesas mi.

- Verŝajne vi scias, - ne ĉesis li - ke Ludoviko Zamenhof diris, ke necesas eduki la ideajn esperantistojn. Kio el mi iĝos, dependas de edukado.

- Nuuu... - eklamentis mi. Ni denove eksilentis por kelkaj minutoj. Poste mi provis min pravigi.

- Tamen, - mi diris - tiu ĉi demando estas ege komplika. Tutegale vi ne estas iu aĵo, sed homo, esperantisto.

- Do jen, ĉi tie kaj estas la tuta esenco de la afero, - li ĵetis al mi.

- Kio? - mi ne komprenis.

- Ne cesas, ke ĉiu esperantisto komprenu kaj eksentu la guston de esperantismo, iu eble ŝanĝiĝus kaj iĝus pli bona, - lekciis li.

- Komprenable, -mi klinis la kapon - eble mi fojfoje ion ne tiel aranĝas kiel decas. - iom atendinte mi aldonis: - Mi petas pardonon.

- Ne,ne - eklaŭdis li min - vi pensu nenion malbonan, vi estas bona lektoro, bona gvidanto. Sed komprenu, ke ankaŭ bonuloj devas kreski, perfekteĝi.

- Komprenable, - mi konsentis - mi faros konkludojn. Mi penos, tamen...

- Kio estas „tamen“? - interrompis li min.

Mi volis diri „...kaj vi penu“, sed mi sindetenis kaj aldonis :

- Kaj mi petas pardonon. Vere ne pro la malbona intenco...

- Ne nervoziĝu... - amike ekridetis li. - Kiu ne laboras, tiu ne eraras.

Li ekridis kaj okulumante observis min. Ho ne, geamikoj, ne plu tiel eblas! En la vivo gravas io alia, kaj mi interalie scias kio estas tio...

- Kion vi volas? - kun la profunda malestimo mi longe observis tiun impertinentulon.

La supereco, kiun mi sentis antaŭ aliaj esperantistoj, po iomete estingiĝis, la humuro mia mizeriĝis, mia vivo ekŝajnis senseca.

verkis kaj sendis **Laimundas Abromas** el Litovio



Kiam mi estis infano
la vivo estis tre ĝojiga
mi komprenis, ke la tempo
ĉiam iras tro malrapide
ofte mi ludis kun mia hejmkato
mia hejmkato estis tre ridema kaj ludema
la timo neniam rigardis min.

Kiam mi kreskis kaj kreskis
la tempo fariĝis min iom grande
mi lernis iom pri la mondo
la mondo ĉiam estas tre okupata
mi fariĝis vojaĝanto
la aŭtobuso kaj aviadilo kunportis min ĉien
rigardante, mia tempo malaperis
mi komencis serĉi mian valoran amikon
dum longa tago
mi daŭre kaj laŭte vokis tempon
mi ricevis neniun respondon.

Post unu monato
mia kara tempo aperis kun arbarokato
plorante rigardis min daŭre kaj senlace
miaj larmoj komencis fali de miaj okuloj
mia tempo forte brakumis min dum longa tempo
plorante diris, ke mi neniam lasos vin
mi pardonpetas kara.

La arbarokato tuj malaperis de nia loko
eble tio povas esti tro malsata
mi aŭdis nenion de arbarokato
ĝentileco helpis lin
vidis lin tre kuraĝa.

La tempo fariĝis tre okupata
mi komencis senlace kuri kun mia tempo
la tempo diras, ke komencu bonan vojaĝon
pensi pozitive kaj trovu pacon
kontento mem bonvenigos vin.

Oh! arbarokato venis en mia hejmo
kunportante arbobananon
metis antaŭ mi kaj kuris for
manĝante mi ĝuis arbobananon.

Unu tago mi kuiris bongustan manĝaĵon en mia hejmo
estis tre urĝa afero kaj
mi devis iri rapide al mia najbarano
la problemo flugante kuris en la cielo
tre interesa parolado kaptis mian tempon
la manĝo forgesis min.

Post kelkaj horoj
mia domo bonvenigis min
kun granda plezuro
ridante diris min, ke
"Ĉu vi ne estas malsataj?"
mi rigardante diris al mia hejmo
mi nur trinkis akvon kaj manĝis frukton
ĉe mia najbarano sed paroladis multege.



Mia stomako estis tre malĝoja
pro tio mi devis manĝi ion manĝaĵon
mia kuirejo plorante rigardis min
kara, mi havas malbonan novaĵon por vi
mi strange haltis kaj forgesis uzi oksigenon
mi sentis tre malĝoja
kaj demandis tro laŭte
"Kio okazis? Tuj diru al mi?"

Mia kuirejo respondis min
hazarde venis unu granda arbarokato
komencis manĝi ĉiujn manĝaĵojn
kaj lasis nenion
bedaŭrinde mi ne povis kontroli lin
mi pardonpetas
la kuirejo fermis siajn okulojn
mi rigardis kaj rigardis dum longa tempo
mi ne trovis ĝustan vorton por diri
finfine mi salutis al arbarokato.

verkis kaj sendis d-ro **Mukunda Pathik** el Nepalo

Super la domo, kie la junuloj interparolis, la atmosfero estis maltrankvila. Flugatakoj skuadis la urbon.

– Ili komencas denove. Ne gravas! Kaj kiel estis poste?

– Nu vi scias, ni estis tute junaj, preskaŭ nur buboj, tuj post la abiturienta ekzameno. Viglaj kaj ludemaj. Hundidoj sen pripensoj kaj sen respondeco. Ni promenis en la granda urbo, kiun ni ne konis, kaj kien ni alvenis la saman tagon. Subite ni eksentis la bezonon por nova societo. Mia amiko proponis, ke ni alparolu po unu knabino sur la strato, sed mi riproĉis lin pro absoluta manko de vera aventuremo. Alparoli knabinon surstrate, kia banalaĵo! Sed mi diris al li: "Nun ni vizitos familion kaj interkoniĝos kun la ĉarma filino de la domo". Mia amiko faris ŝvebajn gestojn ĉirkaŭ sia tempio kaj grimacis demande. Li diris ke mi tiel ade praktikas la idiotecon, kvazaŭ mi estus profesia idioto, idiotisto. Ni same ne konas tiun ĉi urbon, kiel Kuvajton. Mi demandis, kio estas Kuvajto. Li diris, ke ĝi estas urbo ĉe la Persa Golfo. "Vi volas fanfaroni pri via scio", mi diris, "sed vi havas malpli da fantazio ol virga pediko. Mi montros al vi, ke ni vizitos hodiaŭ familion en tiu ĉi urbo". Li rimarkis, ke mi jam havas planon, kaj iĝis pli respektama al mi. Li ne montris tion ankoraŭ; li bruis kaj insultis min laŭ la stilo de knabaĉoj, sed kun kreskanta admiro. Li argumentis, ke ni ne povas scii en kiuj familioj estas belaj knabinoj, kaj sekve la tuta afero estas stultaĵo. Sed mi insistis, ke ne gravas. Ni ja povas provi la bonŝancon kaj li ne timu: mi aranĝos la reston. Mi havas ja pli da fantazio ol abiturienta pediko. Mi efektive posedis fantazon en abundo. Mi volis uzi la recepton de la detektivromanoj kaj iri ien, kie ni rolos kiel kontrolantoj de la akvomezura instituto, kaj se ni havos bonŝancon, ni komencos agrablan interrilaton kun iu el la troveblaj virinoj. Sed pri tio mi ne parolis. Ni vetis. Mia tasko estis eniri en fremdan loĝejon kaj pasigi tie kvaronhoron kaj adiaŭi en plena amikeco. Inter la kondiĉoj estis, ke mi ne rajtas komenci ĉe la eniro per artifiko kaj diri, ke ni vetis kun mia amiko kaj tiel plu, kaj ke devas esti la unua loĝejo kiu estos la scenejo de la privetita agado. Tiel estis.

– Nu, kaj?

– Nu, kaj ni eniris telefonejon por elekti adreson. Mi elektis bonsonan nomon, arkitekton; ne estis malfacile trovi sur la urbokarto, kie estas la strato: la familio loĝis ĉe la ĉefa strato, kaj tute simple mi sonorigis sur la pordo.

– Ni nur baldaŭ povos supreniri – diris tiu, kiu aŭskultis la rakonton.

– Ni restu prefere ĉi tie. Vi vidus, ke ili revenos.

– Nu, bone. Daŭrigu do... Estas streĉa historio.

– Jen la daŭrigo:

Ĉambristino malfermis la pordon. Ŝi estis modelo de ĉarmaj kaj samtempe impertinentaj ĉambristinoj. Mia kamarado havis emon halti ĉe la enirejo kaj resti ĉe la ĉambristino. Sed mi ne cedis al liaj rigardoj. Mi estis "en bona formo". Mi demandis, ĉu fraŭlino N. estas hejme? Mia kamarado ridaĉis malice. Nun montriĝos, ke fraŭlino N. ne ekzistas. Sed mi estis certa kaj efektive mi havis bonŝancon. Fraŭlino N. ekzistis kaj eĉ jam venis el la ĉambro por akcepti nin. Ŝi demandis: "Ĉu vi jam alvenis" kaj ŝi aldonis tre afablan "koran bonvenon!"

Tiu akcepto embarasis min kaj eĉ pli mian, cetere aŭdacan kamaradon, kvankam lia kuraĝo havis iaspecan socian limon. Li estis komencanto en la fako de Casanova, sed liaj viktimoj estis ĉiam servistinoj. Li tute ne estis intelekta tipo. Ni sidis tie hezitemaj kaj timantaj. Ankaŭ mi estus preferinta esti ekstere. Ni ricevis strangan helpon de la hazardo. Nun la problemo estis, ĉu ni povos eluzi ĝin aŭ ne. Kiujn atendis la knabino? Mi estis tiel konfuzita, ke mi eĉ ne sciis, kia ŝi estas; mi ne alrigardis ŝin, nur aŭskultis la unuajn konvenciajn vortojn, kaj sub mia embaraso la melodia, juna voĉo sorbiĝis en mia konscio, kiel tre agrabla plezuro: Agrabla, sed danĝera, mi pensis. Ni estis jam en la bela salono de la familio...

– de kie oni baldaŭ elĵetis vin – diris la aŭskultanto de la rakonto. – Vi pravis, la eroplanoj revenas. Estas denove alarmo!

– Ni restu do trankvile ĉi tie. Ĉu mi daŭrigu? – Kompreneble.

– Ne estis tiel simple. Neniu elĵetis nin. Ni ekvidis en la salono, kies detalojn mi ne perceptis, nur ĝian kulturan etoson; dum ni konversaciis, mi cerbumis, kiel ni povus ekscii kiuj nun ni estas. La fraŭlino komencis demandi pri siaj amikoj, Antono kaj Katerina, kaj mi diris, ke Antono fartas bone, tamen li bezonas ion da ripozo post la printempa ĉefsezono... mi time alrigardis ŝin, sed mi ne diris ion stultan... mi diris, ke Katerina malvarmumis (mi supozis, ke Katerina ne estas tiel kontraŭstara kiel Antono, kiam temas pri malvarmumoj), sed ĉiukaze ŝi jam fartas tute bone kaj ili ambaŭ kore salutas ŝin kaj ke ili jam antaŭe estis nin certigintaj, ke ni havos grandan plezuron interkoniĝante kun fraŭlino N., kion ni nun vere povas aserti. Mia amiko funkciis kiel bas-akompano kaj ĝis nun ĉio progresis bonege. Nun mi jam kuraĝis eĉ rekte alrigardi ŝin; ŝi ne povis esti pli maljuna ol 23-jara kaj verŝajne ne pli juna ol 19. Ŝia varma, agrabla, ne elstare bela vizaĝo kaj ŝia mallaŭta, bela kaj kultura voĉo vekis

unue la sentojn kaj ne tuj la sensojn. Ŝi estis unu el tiuj virinoj, kiuj vere uzas siajn okulojn kiel fenestrojn de la animo. Ŝi gajnis de momento al momento pli kaj pli da simpatio. En la rulfajro de la demandoj mi ne havis tempon por ekhonti kaj pensi pri nia stulta ŝerco. Mi eĉ sentis ekscitan plezuron: jen estis ekvacio kun multaj nekonatoj, kaj jen ili komencis malpliigi. Ni proksimiĝis al la kompleta solvo. Jes, tio venis. Ĝi venis tiel, ke ŝi subite kaj bonhumore diris ion, per kio ŝi rigidigis la rideton sur nia vizaĝo. Nia sango haltis en niaj vejnoj: "Mi tute forgesas" ŝi diris "ke ni estas esperantistoj! Kial ni ne parolas Esperante?" Tie sidis mia kamarado, subite paliĝinta, kaj tie sidis mi, atendanta la finon de la mondo. (Aŭskultu, nova signalo... Ili baldaŭ denove estos ĉi tie! Ne gravas, mi daŭrigas). Mi ne havis intereson pri Esperanto; eĉ malpli mia kamarado. Li havis tute aliajn ideojn ol la interfratiĝo de la homoj. Li estis forta ŝovinisto kaj poste li iĝis konvinkita partiano inter la brunĉemizuloj. Sed mi havis kuzon, kiu studis kaj propagandis Esperanton. Multe li ne kapablis paroli kaj iam mi aŭdis; ke li respondis al alparolo: "Pardonon, mi estas nur komencanto". Per tiu ĉi frazo mi mokis kaj incitis lin konstante. Tiu ĉi frazo savis min por tiu ĉi momento. La alia esprimo, kiun mi konis en Esperanto, "Ĝis revido!", ankoraŭ ne estis aktuala. Sed la unuan mi povis uzi, kaj sendante dankesprimon al la ĉielo pro la mankohavaj scioj de mia kuzo, mi diris al ŝi: "Pardonon, mi estas nur komencanto". Mia kamarado, komprenante, ke la lasta vorto havas ian senkulpigan gravecon, diris kun la plej malbela prononco de la Esperanto-vorto: "Kommensando". Tiel ni savis nin, kaj la afero ne prezentis komplikajn dum la sekvaj du-tri minutoj, kvankam ni jam sciis, ke ni estos senmaskigitaj, kaj miaj genuoj komencis tremi, dum mi pensis pri la lasta, sed drama sceno, kiam mi devos forlasi tiun ĉi belan hejmon kun ĝia animo. Ni vidis neniun el la aliaj familianoj. Miaj sentoj varmiĝis kun danĝera rapideco. Ŝajnis, ke ankaŭ mia kamarado moliĝas. Sed nun abrupte aperis la komenco de la fino. La knabino diris: "Sed strange, ke vi venis preskaŭ tutan horon pli frue, ol Katerina menciis en sia letero: Laŭ tiu vi devus veni precize je la kvara". Mi rigardis mian horloĝon. Mankis dek minutoj ĝis la kvara. Post proksimume kvaronhoro alvenos la veraj atenditoj, kaj ni estos stampitaj kiel trompisto. Terura situacio! Vi ridas ĉi tie, sed tiam tio estis multe pli terura ol tiu bruo supre. Almenaŭ al ni. Oni povis pensi nur pri tuja foriro, sed tio estis neeble; la tablo estis jam kovrita kaj ni sentis la vaporon de la freŝe rostita kafo. Dum la cerbumado pasis pluaj, multekostaj, du-tri minutoj. Mi komprenis, ke nur kuraĝa operacio povas savi nin. Mi ekstaris kaj diris al nia nova amikino: "Fraŭlino N., mi ŝatus kun vi paroli inter kvar okuloj". (Mi ne volis kavi

atestanton al mia konfeso, eĉ ne mian amikon). Ŝi sekvis min kun mirantaj okuloj en la alian ĉambron.

Mia konfeso komenciĝis per tio, ke mi prezentis min; efektive ni ne prezentis nin komence, sed nek ni nek ŝi tion rimarkis. Post tio mi lasis tempon nek por interjekcioj, nek por rimarkoj. En unu spiro mi konfesis, pardonpetis, denove pardonpetis, ripete konfesis, kaj apenaŭ mi atingis la finon de miaj rakonto kaj klarigo, ni aŭdis sonorigon. La esperantistoj, kies lokon ni uzurpis, alvenis.

– Kiel ŝi akceptis vian historion.

– Estis tre interese. Komence ankaŭ ŝi ne sciis, kion diri, sed fine ŝi ridis, ridegis; ŝiaj larmoj same perlis pro la rido, kiel ŝia rido mem. Mi kredas, ke ŝi sentis sin feliĉa: ni ambaŭ estis bonaspektaj junuloj, tute ne sen sprito.

– Precipe vi, ĉu ne?

– Mi ne scias, ĉu tio estis ŝia opinio, sed ŝi estis feliĉa, ĉar ŝi povis pruvi al ni la pravon de Esperanto. La aliaj du gastoj estis simpatiaj junuloj kaj dum la tuta posttagmezo ni restis kune. Ŝi gardis nin tre afable, tute ne parolante pri nia friponaĵo. Ni estis gastoj el alia direkto; pli multe la aliaj ne sciis pri ni. Sed io kaptis min tiam. Tiu ĉi historio estas pli ol okjara, sed mi bone memoras ĝuste pri io speciala. Antaŭ nia foriro de ili mi demandis ŝin pri io, ĉar mi estis ekstreme skeptika. La societo intertempe pligrandiĝis, ni interkoniĝis kun ŝia tuta familio, tiel, ke efektive estis okazo al mi diskuti nur kun ŝi: Mi formulis mian demandon proksimume jene: "Sed ĉu povas esti, ke vi vere kredas pri la paciga forto de via Esperanto?"

Ŝi respondis: "Nu, jen: al mi ĉiuspeca fanatikeco estas fremda, eĉ timiga. Tio, kion ni vidas ĉirkaŭ ni sufiĉas, por ke ni timu la ekzaltecon. Mi iĝis iam esperantisto, ĉar tiam mi estis tute juna kaj idealisto: eble ankaŭ tio havis decidan gravon, ke mi esperis multe da plezuroj, facilaj plezuroj. Por mi malfermiĝis la mondo, kiam ĝi malvastiĝis por la aliaj. Kiel esperantisto mi travivis ravajn epizodojn, surprizajn por ĉiu pesimisto. Daŭrus tre longe paroli pri tio. Sed unu afero estas certa: ke el tiuj mozaikeroj jam elformiĝas tute klara konvinkiĝo. Ĝi ne estas plu supra bildo; ĝi havas profundon kaj perspektivon. El la plezuroj fariĝis taskoj kaj konscio, el la konscio konscienco; respondeco pri ĉio, kio okazas en la mondo..."

"Dostojevski" mi diris.

"Jes iel, kiel Dostojevski komprenas kaj komprenigas la respondecon de ĉiu unuopulo. Nun mi eble ne scias, ĉu mi povas kredi pri la proksima sava rolo de Esperanto; patentmedicino ĝi ne estas. La tempoj estas pli kaj pli malhelaj: kio povas sekvi, pri tio mi eĉ ne volas pensi. Sed tamen mi kredas – jes, mi kredas... sed cetere la demando ne plu povas esti, ĉu

mi kredas, ĉar mi tute simple vivas en Esperanto".

Proksimume tiel ŝi diris. La aŭskultanto demandis:

– Kiel estis poste?

– Poste mi mem iĝis esperantisto.

La bruo plifortiĝis. Sed tio estis la propraj kanonoj.

La aliaj nun certe estis proksime. Ĉu la celo estis la stacidomo? Nu, tiu spektaklo ne daŭros longe. Estis eksplodo ie pli proksime. Ne gravas.

– Kaj poste?

– Nenio estis poste.

– Ĉu vi enamiĝis al ŝi?

– Jes, iel simile. Sed ŝi preferis mian amikon. Ŝi ne povis esti feliĉa. Li tiriĝis al aliaj magnetoj.

– Kie li nun estas?

– Li kuŝas en amastombo en Balkano. Li estis voluntulo.

– Kaj ŝi?

– Ŝia patro estis gvidanta liberpensulo. Malamiko de la nacio, kiel oni diras. Mi ne scias, kie ŝi povas esti. Eble ŝin savis ŝia bona stelo.

– Kion vi pensas do nun?

– Mi havas nur unu brakon kaj povus havi kaŭzon por esti amara. Sed mi ne estas tia. Mi ofte pensas pri tiu ĉi epizodo. Estis interese interkoniĝi kun tiu knabino. Estus bone scii, kie ŝi estas. Estus bone scii, kie estas niaj similuloj. Sentimentala mi ne estas, sed mi havas la guston de bela, homa travivaĵo en mia animo. Mi pensas ofte nun pri la vortoj de Dostojevski: "Ĉiu el ni estas respondeca por ĉiuj kaj por ĉio, kio

okazas sur la tero". Mi kredas, ke ankaŭ nun formiĝas tiaj mozaikoj; ankaŭ nun, dum tiuj ĉi senhontaj tempoj maturiĝas homaj pensoj, kiuj signifas Esperanton, aŭ simple fratajn ideojn. Kio ajn okazas, mi kredas pri tio.

La infera klakado de la flugmaŝinoj subpremis ĉiun penson kaj ĉiun vorton.

– Nun ili estas super ni. Ho –

* * *

El la bombŝirmejo de la vilao oni elfosis du junajn virojn. La unubrakulo, la rakontinto, jam ne plu vivis, sed la alia militkriplulo jes. Baldaŭ klariĝis, ke liaj vundoj estas malgravaj. Rekonsciiĝinte li baldaŭ retravis la lastajn vortojn de sia kamarado. Li ne plu estis videbla al li; li vidis nur sangon. Li ne sciis, ĉu estas lia propra aŭ tiu de la kamarado. Rigardante la ruinojn, li murmuris al si frazon, kiun li volis eldiri antaŭ la eksplodo. Estis alia frazo, citaĵo el la Kulpo kaj puno de Dostojevski. Li ne havis tempon diri ĝin kaj nun li provis per ĝi formi ponton super la abismo, kiu disigis la vivanton de la mortinto:

"Mi klinas mian kapon ne antaŭ vi, sed antaŭ la suferoj de la homaro".

La vivo volis vivi kaj sekvis novaj taskoj.

-- rakonto de **Ferenc SZILÁGYI** el Hungario

Aperis en Koko krias jam, Régulo 1955

Fonto: **Dudek kvin klasikaj Esperantaj noveloj**
<http://literaturo.esperanto.net/noveloj/08.html>

5>> edzinon, li iris al Svedujo por serĉi sian biologian familion. Li trovis siajn onklinon kaj onklon. Li probable tiam eksciis, ke lia patrino mortis. Tamen ŝajnas, ke ŝi ne restis en kontakto kun sia vera familio.

La granda majstro Carl Theodor Dreyer probable ne povis eviti la ombron de sia propra patrino dum sia vivo, sed li multe uzis ombrojn kaj lumon, precipe en la filmo Vampyr kie ilin li uzis majstrece. Diversaj fontoj montras, ke li estis obstina kaj zorgema direktoro. Kaj kontraŭe al la matura, ĝentilema aspekto en sia maljuneco, li estis ribela kaj kuraĝa viro en sia junaĝo.

Estis du Dreyer: La unua, aviadisto (balonisto) kaj raportisto, kiu riskis sian junan vivon. La dua trankvila burĝo, kiu pasigis la lastajn 30 jarojn de sia vivo trankvile loĝante kun sia familio en modesta loĝejo sur la Bulvardo Dalgas en Frederiksberg. Sed ĉu ni ĉiuj tamen ne havas du kaj eĉ pli multajn ecojn?

Kiam Ingmar Bergman naskiĝis, Carl Theodor Dreyer jam faris sian unuan filmon (1918) kaj havis 29 jarojn. Lars von Trier, aliflanke, eĉ ne estis en ĉi tiu mondo. Dreyer estis el la pioniro de ambaŭ ĉi tiuj du skandinavoj kaj ankaŭ de la mondaj "aŭtoro-direktoroj".

Li bone uzis lumon kaj ombron, homajn vizaĝojn kaj sonon en la epoko de sona-kinejo. "Ordet" (La vorto), "The Day of Wrath" (La Tago de Kolero), "Vampyr" (vampiro) estas la plej bonaj ekzemploj de nigra-blanka kino. La sono de la vento uzita en la fono en la unuaj du donas al ni senton de malsekureco. Ĝi memorigis min pri la filmoj de Bergman.

Ĉu la kuraĝa virino, kiu asertis sian amon en "The Day of Wrath" (La Tago de Kolero), ankaŭ estas delogantino? Ĉu li vere estas sorĉistino? Ĉu tiel interpretis ĝin la direktoro? La direktoro lasas nin en hezito. En la finalo, la senama patrino, akuzita de ŝia bopatrino kaj ŝia amanto (ankaŭ la filo de la unua geedzeco de ŝia edzo), diras, ke ŝi estas sorĉistino...

"Vampyr" (Vampiro) ne estas sangoverŝa filmo same al la vampiraj filmoj, kiujn ni konas. Ĝi timigas, ĝi kaŭzas anserhaŭton, sed tamen tion ĝi faras tre milde. Sen uzi troe la perfortajn scenojn. Ĝi estas originala.

En "Ordet" (La Vorto), Johannes, kiu estas obsedita al Jesuo kaj Kierkegaard, ĉirkaŭpaŝas pensante, ke li estas Mesio kaj predikas per senĉesa voĉtono. Nek lia patro, kiu estas vigla kristano, nek lia



granda frato Mikkel, kiu estas nekredema, nek la urba pastro ne konsideras lin serioze. Tamen, ĉe la fino de la filmo, li diras, ke neniu kredas kun sia koro kaj petas al dio revivigi sian mortan onklinon Inger. Kaj Inger resurektas. Ni pensas, ke Johannes ne sukcesos ĝis la fino de la filmo. Ĉu tio estas sindromo de Lazaro aŭ Johannes estas vere Mesio? Dreyer eble ne volis surprizi nin, mi pensas, ke la reĝisoro vere estis kredema homo.

Ĉi tiu filmo estis elektita inter la plej menciitaj "10 Plej bonaj filmoj de ĉiuj tempoj".

Aliflanke "La Passion de Jeanne d'Arc" (La Pasio de Jeanne d'Arc) estas filmo, kiun mi ne tiom ŝatis, kaj mi trovas la aktoradon kaj precipe la vizaĝajn esprimojn de la ĉefa aktoro Renée Jeanne Falconetti tre senmovaj. Tamen ĝi estis tre laŭdata. Sed en ĉi tiu filmo, la figuroj, la lumo kaj precipe la sceno de la fina ekzekuto kaj kaoso estas tre impresa. Multaj aferoj povas esti diritaj pri Dreyer, sed mi lasos ĝin al la kvadratoj de liaj ĉefverkoj!

Konuralp Sunal

24-a de marto 2021

Büyükdada İstanbul, Turko

* *SİNEMAYA GİRİŞ DERS NOTLARI DOÇ. DR. ŞÜKRÜ SİM, İSTANBUL ÜNİVERSİTESİ AÇIK VE UZAKTAN EĞİTİM FAKÜLTESİ RADYO TELEVİZYON VE SİNEMA PROGRAMI*

** <https://www.carlthdreyer.dk/en/carlthdreyer/about-dreyer/biography/biography-extended>

*** <https://www.carlthdreyer.dk/en/carlthdreyer/about-dreyer/biography/biography-extended>

32>> kiel antaŭ kelkaj monatoj sur ŝtuparon kaj pensante, ke tio ne gravas, almenaŭ mi ne forelspozos la monon. Post ioma duondormo mi eksentis ke iu kuŝiĝas apud mi, tial mi laux kloŝarda* kutimo turnis al tiu venulo mian dorson. (Ĉar ĉefe la dorsojn estas necese ŝirmi por ne malvarmumi). Iom post iom ĝi enmetis sian manon sub mian mantelon kaj tuŝis mian bruston kaj denove ion serĉis, cetere tie mi monon ne havis kaj post mallonga momento sur mia vango mi sentis kison. Mi tuj pensis, ke tio estas ia ĉarma virino. Sed tiuj fingroj premis mian gorĝon, tamen mi ne lasos strangoli min, mi fulmrapide stariĝis kaj ekdiris: „Ho, kia diablo!“ Mi ne plu memoras, ĉu esperante, ĉu france, aŭ ĉefe.

Antaŭ mi staris malbelaĉa viro kun elruligintaj okuloj kaj malfermita buŝo kun fiaj dentoj. Mi tuj preskaŭ pro ĉi tio vomis. Kaj anstataŭ miaj planoj por dormi en ia hotellito, mi pro la sentita naŭzo en mia stomako fordrinkis mian monon en dumnokte malfermitaj kafejoj. Kiam mi pri ĉi tio rakontis al triopo el miaj laborkunuloj, unu el ili pli poste vidante min prepariĝi al foriro urben, diris al aliaj: „Vidu, tiu Vesely preparis sin por iri rendevui kun la „Demoiselle du Châtelet“. (Fraŭlino Ŝatle). Tiam ni ĉiuj elkore ridis.

En nia plurnacia kolektivo laboris kvaropo da muzulmanoj kaj dum ilia ramadano ili estis tre lacaj,

ĉiufoje kiam mi povis, mi helpadis al ili dum laborego. Mi estis plene konvinkita, ke ĉiuj krom tiu ŝtelisto, konsideris min, kiel bonan amikon, eĉ la magazinestro diris, ke mi kondukas kiel Jesuo. Li ankoraŭ eble ne sciis, ke ekzistas iu, kiu nomiĝas H. A. Grouès (abato Pierre). Ĝuste ĉi tiu homo apartenas al tiuj, kiuj malfermis miajn okulojn.

Kiam ni fariĝis malkontentaj kaŭze de niaj salajroj, ni ekkomencis striki, eĉ se la duono el la tuta kolektivo ne sekvis nin.

Mi kuraĝigadis strikantojn dum la tuta semajno kaj post ĝi alvenis decido el la nederlanda centro, ke niaj salajroj estos plialtigitaj. Mi ne scias, kion pri mi pensis nia direktoro, vidante min inter la strikantoj. Tamen li vidis pli ĝojplanan kaj pli laboreman kolektivon, ol tio estis antaŭe.

Iun tagon pensiuliĝis nia maljuna ĉefo. Anstataŭis lin pli juna, tute nekompetenta, tial mi forlasis ĉi tiun fabrikhejmon, en kiu mi pasis 11 monatojn.

**kloŝardo estas persono, kiu propravole forlasas normalan civilizon, vivas en metrooj kaj sub pontoj, celante absolutan liberecon, diference de vagabondoj kaj senhejmuloj, kiujn elpelis mizero.*

22>> Tamen ĉesu, plendo mia,
Se antaŭen vokas devo.
Kantu, harpo melodia,
Pri la land' de nia revo ;

Ĉar iam ni revon komencis sen limo
Pri lando eterna de paco kaj gojo ;
Sed kanto de nia komuna animo
Kun voĉo karega perdiĝis sur vojo.

Kaj vagadas nun fantome
Mi, kun floroj en la manoj
Por disporti ŝianome
Al laculoj kaj infanoj.

Edmond Privat *



* *Edmond PRIVAT (1889-1962) estis franclingva svisa esperantisto, doktoro pri historio, universitata profesoro, verkisto, ĵurnalisto kaj movada aktivulo el Svislando. Esperanton li eklernis en 1903. Lia verkaro konsistas el originalaj dramoj, poemoj, rakontoj, lernolibroj kaj libroj pri la Esperanto-movado. Ekde 1932 Privat, amiko de Gandhi, estis prezidanto de la Eŭropa Komitato por la sendependeco de (Brita) Hindio. Li konsekvence daŭrigis sian agadon kontraŭ koloniismo kaj por justa rekono de Azio*



Solvo de la kruccvortenigmo

MAL	SA	ĜU	LO	VI	AD	RIA	TI	KA	ME	RU	NO
LE	ĜO		ĜAN		MO	DO					
					KO						
					LO						
					NO						

Mia unua laborokupo

Originala esperanta rakontado de amiko – SAT-ano kaj mondcivitano Adolfo Veselý.

Kiam mi foriris el Emmaüs-centro, mi serĉis laboron.

Dum mia vagado sur la stratoj de Boulogne-Billancourt mi haltis ĉe tiu fabriko kaj eniris. Iu civilvestita viro rimarkis min kaj rigardis min ekde la piedoj ĝis la kapo kaj poste demandis: „Kion vi serĉas, sinjoro?“

Mi estis surprizita, ke iu al mizeraspekta vagulo, kia mi tiam estis, diras al mi sinjoro. Mi turnis mian kapon malantaŭen, por scii, ĉu iu staras post mi. Vidante neniun, mi hezite respondis: „Mi serĉas laboron.“

Li invitis min en sian oficejon kaj trarigardis miajn paperaĉajn dokumentojn, demandante kie mi logxas.

„En metroo-vagonaroj, sinjoro,“ mi diris embarasite. Li momente silentis kaj poste diris, ke mi rakontu pri ĉi tio. Do, mi al li eksplikis, kial mi estas devigata vivi en tiuj subteraj vagonoj kaŭze de bruligitaj piedoj, kiuj ankoraŭ nun bezonas varmon, kaj ankaŭ tie akiras monon, sed ne per almozpetado.

„Ĉu vi povas al mi diri, kiel tio eblas?“ li diris mirigite.

Kaj mi, sentante, ke li interesiĝas pri mia sorto, mi kontinuas pluparoli.

„Mi sidas sur benkoj de metroo-stacio apud distribuaj aŭtomatoj, en kiuj estas frandaĵoj. Iuj vojaĝantoj enmetas en ilin la monerojn. Kiam alveturas ilia trajno, certaj homoj – verŝajne ne parizanoj, ĉar nesciantaj, ke baldaŭ alveturos alia – tro rapide tiras la aŭtomatan tirkeston kaj ĝi restas blokita. Ili simple ensaltas vagonaron kaj mia mano prenas el la aŭtomatflanka kanaletto 1 forgesitan frankon. Vespere ĉe Savarneo estas kun 5 frankoj sufiĉe abunda manĝo kaj mi ankaŭ aĉetas vojaĝbileton por uzi pli poste la lastan vagonaron, kiu restas nokte en iu el la stacioj kaj en kiu mi povas surplanke dormi ĝis mateno, post kiam ĉiuj personoj eliros kaj enirejoj estos fermitaj.“

Kiam mi finis mian rakontadon, mi konstatis, ke li estas direktoro kaj mi atendis lian reagon. Post la fortrinko de proponita kafo li diris: „Sinjoro Veselý, mi komprenas vian situacion kaj ekde nun sentu vin ĉe ni

kiel hejme. Provizore vi povas tranoktadi en la vestejo, sed mi petas, ke vi atentu, se vi fumus, ke tio ne kaŭzu incendion. Ni premis la manojn kaj la amika dungigo estis finita. Poste li prezentis min al la laborkunularo kaj mi ĉiam post la fino de la labortago uzis la duŝon kaj en la vestejo sur malplenaj sakoj, sur kiuj estis surskribo Eburio, mi kontente endormiĝis. Nian direktoron mi vidadis malofte. Kaj eĉ liajn bonintencajn proponojn mi ne ĉiam akceptis. Iam li venis kaj diris al mi: „Venu kun mi al la kakao-muelilo, tie laboras unu alĝeriano kaj mi preferus, ke vi tie laboru per tiu maŝino, vi havos duoble plialtigitan salajron!“

Sed mi tuj rifuzis, dirante al li, ke tiu laboristo laboras diligente kaj zorgas pri siaj infanoj. Tial li bezonas gajni multe pli ol mi, fraŭlo.

En nia kantino estis viraĉo, kiu ĉiumatene preparadis por ni manĝon kaj kakaon, kiun ni ricevadis senpage. Okupiĝante kelkfoje pri ŝarĝado de kamiono, miaj kunuloj demandis min, ĉu iri matenmanĝi, aŭ prefere finŝarĝi la varojn. Mi diris, ke ni unue ĝisfinigu la laboron kaj poste matenmanĝos. Sed tiu kantinisto ŝlisis la pordon kaj ne volis nin servi. Neniu el ni iris tion diri al nia direktoro. Mia sola protesto estis simpla: mi demetis mian laborveston kaj duŝis min kaj en pura vestaĵo trairadis nian laborejon. Kiam vidis min miaj laborkunuloj, ili diris al nia grizhara bonkora ĉefo: „Vesely prave foriras kaj vi nenion diras?“

Kaj li respondis: „Kion mi diru al mondcivitano?“ (Ili ĉiuj konsideris min tia.) Miaj paŝoj kondukis min en kafejon, kie mi ion manĝis kun la kafo kaj fumante unu aŭ du cigaredojn mi aŭskultis per muzik-aŭtomato rokenrolan, aŭ jazan muzikon. Kutime de Sidney Bechet aŭ de Louis Armstrong. Ĉefe al mi tre plaĉis aŭskulti la „Rock Around The Clock“ de Bill Haley. Post ĉi tiuj agrablaj ripozoj mi trankvile revenis en laborejon. Pro la stulteco de nia kantinisto nia direktoro iel eksciis pri ĉi tio, kaj faris en nia kantino kontrolon. Li trovis, ke tiu fiulo estas ŝtelisto de kuireja oleo kaj de aliaj varoj kaj maldungis lin.

Iun vesperon mi decidis veturi al Parizo por poste tie dormi en hotellito. Ĝojante mi vagadis en la stratoj kaj la vetero estis milda. Iom laciĝinta mi eksidis sur ŝtupon ĉe enirejo de la metroo Châtelet. Kiam oni fermis ĝin, mi ne plu planis trovi ian hotelon kaj kuŝiĝis



>>31

SITE DE L'ASSOCIATION DES AMIS DU CDELI



RETEJO DE LA ASOCIO AMIKOJ DE CDELI

TURKA STELO

Eldonanto : Turka esperantistaro

Redakcio : Vasil Kadifeli - vasilkadifeli (ĉe) gmail (punkto) com

Ĉeflingvo:	Kodo:
Esperanto (+turka)	Li-TUR-06

CDELI: Centro de Dokumentado kaj Esploro pri la Lingvo Internacia - Biblioteko de la Urbo La Chaux-de-Fonds